

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ huhtikuu ♦ aprilo ♦ 2/2004



La freŝaj ventoj en Esperanto-mondo flirtigis ankaŭ la flagon ĉe VT-ejo. Pli pri la Vintraj Tagoj sur paĝoj 8-9 kaj 18.

Estonio, p. 4 ♦ Mikaelo Bronŝtein, p. 10

Sinfoniaa esperantoksi, s. 12 ♦ Dolchamar rokas hejmlande, p. 9

Raita Pyhälä aganto de la jaro, p. 15 ♦ Historia laborgrupo, p. 7

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ ef_redakto@tiscali.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

tgrundstrom@

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ www.lailanet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli.huuskonen@helsinki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Auli Vihermä, Riisikuja 11 G, 90460 Oulunsalo. ☎ (08) 554 5587 ✉ auli.viherma@pp.inet.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Timo Pirinen, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 ✉ timospi@suomi24.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Esperanto en la Eŭropa Unio: Malfermiĝis nova ĉapitro

Malakcepto povas estis sukceso, eĉ triumfo. Tio validas pri la malakcepto de propono pri esperanto en la Eŭropa Parlamento. Malgraŭ la facile rememorebla dato de la plenkunsida pritrakto, la 1a de aprilo 2004, ne temis pri aprila ŝerco. La Eŭropa Parlamento efektive voĉdonis pri propono favore mencianta esperanton. Per tiu voĉdono malfermiĝis nova ĉapitro en la historio de esperanto en la Eŭropa Unio.

La Eŭropa Unio plilarĝiĝos la 1an de majo. Tio signifas ke la nuna kvanto de 11 oficialaj kaj laboraj lingvoj preskaŭ duoblighos. Tiukuntekste okazas plurnivela aktiveco en ĉiuj institucioj de la unio, ankaŭ en la parlamento, kie la konstitucia komitato ricevis la taskon proponi amendojn al la parlamenta regularo cele al certigo de klara kaj justa proceduro pri la uzo de lingvoj post larĝiĝo.

La decidpropono de la sendependa, itala parlamentano Gianfranco Dell'Alba enhavis mencion de esperanto. En punkto D de la antaŭkonsideroj estis alvoko pri daŭrigo de la streboj konservi la eŭropan lingvan kaj kulturan plurecon, kadre de kiuj estu esplorata, inter alie, ĉu la enkonduko de paralela neŭtrala pontolingvo, kiel esperanto, povus kontribui al konservado de la lingvoj kaj evito de unulingva superrego. Tamen, la komitato la 16an de marto, per malgranda plimulto, 14 kontraŭ 12, forigis la lastan parton de la antaŭkonsidero D. Tiel la mencio de

esperanto forfalis de la propono al la parlamento.

Dell'Alba decidis reprezenti la tekston, sed por atingi voĉdonon en la plenkunsido, necesis antaŭa subteno de almenaŭ 32 parlamentantoj ĝis la 19a horo lunde la 29an de marto. La kuraĝa elpaŝo sukcesis. Kolektiĝis 20 individuaj subtenoj kaj unu grupa de EDD reprezentanta 18 parlamentantojn.

Bedaŭrinde ni ne scias kiom da parlamentanoj fine voĉdonis por la propono, sed ni ja scias ke la kvanto ne estis signifa. Tion montras la multaj respondoj de parlamentanoj, kiuj atingis esperantistojn en la lastaj tagoj de marto. Tiam okazis kunordigita lobia agado de esperantistoj en la Eŭropa Unio, al kies sukceso kontribuis ankaŭ EAF kaj pluraj finnaj esperantistoj.

Esperanto jam povas esti konsiderata temo traktita, temo ekzistanta en eŭropunia kunteksto. Esperanto evoluis de afero troviĝanta klare ekster ia realisma konsidero al afero eventuale iam konsiderinda. Kiel esperantomovadano kaj aktiva sekvanto de la eŭropunia lingvopolitiko, mi certas ke ni en la sekvaj jaroj spertos ankoraŭ plurajn momentojn de reala konsidero de la temo esperanto en la Eŭropa Unio.

*Anna Margareta Ritamäki
Prezidanto de
Esperanto-Asocio de Finnlando*

Estonio sur sojlo de ŝtata matureco

Libereco – diverseco de opinioj


Antaŭ nelonge oni starigis en Tallinn sur la Placo de libereco monumenton – Horloĝon de libero. La monumento konsistas el du kolonoj, ronda kaj kvadrata. Unu horloĝo montras la kurantan tempon, la alia montras la tempon de la liberiĝo ekde 1991. Granda kaj forta simbolo en la centro de la urbo kaŭzis akran diskuton. Nome, Estona respubliko estas restaŭrita laŭ la jura kontinueco, do, estas ne nova ŝtato ekestinta pro la disfalo de Sovetunio, sed ŝtato fondita en 1918 kaj en 1991 liberiĝinta de la Rusa-Sovetia okupacio.

Estonoj jam longe ne estas tiel unuanimaj kiel en la komenco de la 90-aj jaroj. Tiam komunaj malfacilaĵoj unuigis la popolon kaj oni rigardis al la estonto ofte tra rozkoloraj okulvitroj. De la liberiĝo kaj memstariĝo oni esperis tro multe. Ne ĉiuj alkutimiĝis kun rapidaj sanĝiĝoj. Homoj sentas malegalecon kaj tio kaŭzas malkontenton, precipe inter parto de pensiuloj, kiuj ne povas normale vivteni sin pro malalta pensio.

Tamen, Estonio estas nuntempe demokratia kaj libera socio. Ĉiu povas partopreni en politika vivo en diversaj partioj kaj celgrupoj kaj tiel influu socion. Sendube, ek de la reliberiĝo Estonio atingis multon. Invito al la Eŭropa Unio kaj NATO atestas nian maturecon kiel ŝtato.

Mankas naivuloj, kiuj opinias, ke nia geopolitika situo permesas al ni izolite konservi sendependecon. Estonio plenumas postulon de NATO elspezi 2% el la enlanda ekonomia tutprodukto al defendoelspezoj. La disvastiĝajn kontraktojn de NATO aprobis jam ĉiuj membroŝtataj parlamentoj.

Onidire la mondo videblas diference depende ĉu vi rigardas tra la bankoficeja fenestro aŭ tra la fenestro de apudurba domaĉo. Por ricevi objektivan bildon pri la hodiaŭa Estonio oni devas havi superrigardon pri ekonomio, sanprotekto, medio kaj klereco.



La Horloĝo de libero.

En ekonomio kresko, sed minacanta neekvilibro

La ĉefa politiko de stabilaj socioj estas ekonomia politiko kaj la ĉefa instrumento estas impostoj. Ĉefaj impostoj en Estonio nuntempe estas 18% vendimposto, 26% persona enspezimposto, 20% socialimposto kaj 13% malsanulkasa imposto. Laŭ freŝaj esploroj plejmulto de la popolo subtenas malaltigon de impostoj, sed la rezulto estus pli malgranda buĝeto. Kvankam la ekonomia kresko en Estonio sur la fono de tutmondaj problemoj estas relative sukcesa, vidas specialistoj tamen kelkajn problemojn en la konkurencopovo, pro kio minacas malvarmiĝo de la ekonomia klimato en Estonio.

Kresko de la enlanda ekonomia tutprodukto baziĝas grandparte sur eksterlandaj kreditoj, kiuj pro granda amplekso povas superforte ŝarĝi estonan ekonomion. Se ne okazos salta pligrand-

iĝo de la eksporto, onidire sekvos baldaŭa malrapidiĝo de la ekonomia kresko. Multaj investoj estas faritaj antaŭpage en espero pri kresko de la eksportoamplekso. La ekstera ŝuldo estas proksimume 70% el la enlanda ekonomia tutprodukto. La problemo estas en tio, ke importoj kreskas pli rapide ol eksporto kaj defcito de ekstera komerco konstante pligrandiĝos.

Konkurencopovo de Estonio ne estas konsiderinde granda. Tio, ke oni amase konstruas komercajn centrojn ne pligrandigas nian konkurencopovon. Se ne venos longeatendata kresko de la eksporto, malpliigigas la ekonomia reputacio ĉe eksteraj investantoj, povos malboniĝi la estona financa fidindeco kaj leviĝi la procentoj de la bankaj pruntoj. Siavice tio povos kaŭzi ekonomian malkreskon, malrapidiĝon de la leviĝo de salajroj kaj kreskon de senlaboreco.

Al pli unueca Eŭropo

La demandado inter niaj ekonomispecialistoj montris, ke laŭ la plejparta opinio loĝanto de nia lando gajnas salajre aliĝante al EU. Samtempe nin atendas neeviteble la altiĝo de prezoj. La plialtiĝo de vivokostoj tute egale estas neevitebla, kaj ĉar la diferenco de salajroj kompare kun EU-landoj nun estas multe pli grandaj ol la diferenco de la prezoj, mankas kaŭzo opinii, ke malpliigigos la reala aĉetopovo de homoj. Senlaboreco restas problemo ĉiuokaze.

Estonia vivnivelo nun estas 42% el tiu de EU. Laŭespere Estonio atingos la nunan nivelon de EU dum 20 jaroj kaj egaliĝos dum 30 jaroj. En la sukcesotabelo de la monda ekonomia libereco kiun konstigis Heritage Foundation, Estonio troviĝas sur alta 6. loko (en etŝtata kategorio). Kun ni dividas tiun lokon Danio apartenanta en EU, unu lokon antaŭas Irlando, same membro de EU. En alia tabelo de mondaj konkurencopovaj landoj en la kategorio de etŝtatoj gvidas Finnlando. Ŝajne la famo pri deviga eŭroburokratio estas troigita.

Tamen, aliĝante nia ekonomia modelo ne povos esti daŭre malaltimposta. Tutmondiĝo de

ekonomio estas objektiva procezo. La ekonomia konkurencio ĉiam pli kaj pli okazas inter kontinentoj. Ekonomiaj ŝancoj de la unuiĝinta Eŭropo pligrandiĝas en la tutmonda konkurencio.

Pro influo de lokaj sindikatoj malnovaj membroj de EU penas malhelpi liberan fluon de laborfortoj, tiamaniere kontraŭstarante al unu el fundamentaj ideoj de EU. Vole-nevole kapitalo serĉas por si pli favoran lokon kaj diskriminacio povas doni nur provizoran efekton. En la konteksto de tutmondiĝo durapideca Eŭropo estas hipokriteca Eŭropo.

Indas klopodi por sano kaj eduko

Lige kun grandaj sociekonomiaj sanĝiĝoj dum la lastaj jaroj ankaŭ en la homa vivmedio estas okazintaj vastaj sanĝiĝoj. Multaj el ili malfavoras sanon. La sano de la estona popolo malboniĝis dum lastaj 5-8 jaroj. La influo de mediaj faktoroj estas rekte ligita kun la vivmaniero kaj kutimoj de la loĝantaro, same kun la socialaj faktoroj. Ĉi tie helpas nur kompleksaj agadplanoj por plibonigo. Interreta pridemandado montris, ke 45% el estonoj konsideras la plej detrua kialo kiu pleje ruinigas homojn – alkoholismo.

Lastatempe oni ofte kritikas pri nesufiĉa klerigkoncepto. Malkontentaj estas kaj instruistoj kaj lernantoj-studentoj. Laŭ opinio de kritikuloj la ŝtato ne ĉiam garantiis modernnivelan fakan kleron, sed la kvanto de studentoj estas pli granda ol iam ajn antaŭe. Supera klereco fariĝis pli kaj pli paga. En kuranta jaro nur 5000 studentoj ĝuas senpagan studadon laŭ ŝtata mendo.

Konekse kun malgrandiĝo de naskiĝkvanto de infanoj dum la jaroj 1988-2001, oni devas daŭre fermi bazlernejojn kaj gimnaziojn. En la kuranta jarcento finis sian funkciadon jam 69 lernejoj. Klerig- kaj sciencministerio nomas ĝin ordigon de lerneja reto. Laŭ la ministeria prognozo dum sekvaj 7 jaroj la kvanto de lernantoj malpliigigos ankoraŭ preskaŭ kvaronon. Konkurencio okazas ankaŭ en klerigsistemo. Tio okazas en lernejo kaj ankaŭ inter lernejoj. Dum las- ▷

Konatiĝe kun la najbaroj

En Esperanta Finnlando komenciĝas ĉi-numere artikolserio, kie najbarlandanoj prezentas pensojn pri sialanda socio. Ĝin komencas Tõnu Hirsik, prezidanto de Esperanto-Asocio de Estonio.

Onidire ni finnoj havas grandfratecan pensmanieron pri Estonio. Ekde komenco de la 90aj jaroj ni kutimiĝis pensi Estonion esti loko, kie ni povas aĉeti kion ajn per malalta prezo, kie ĉiuj komprenas nian finnan lingvon kaj kie neniu konas veran merkatan ekonomion.

Tiuj pensoj eble havis ankaŭ sian bazon, sed oni devas akcepti, ke malgrandaj fratoj atingas maturecon kaj ne ĉiam sekvas niajn piedspurojn. La finna lingvo estas nenio memklaraĵo en Estonio. Ĝi estis eble pli multe da tio iam por la senpropra-ŝtataj kaj senpropra-televidaj estonoj, sed nun ili scipovas mem aĉeti la samajn usonajn televidseriojn al sia propra televido.

En politikaj kampoj Estonio klare pretas fari siajn elektojn sendepende de Finnlando. En la Eŭropan Union ĝi komence de majo iĝas nia kunulo, sed en alia internacia kunlaboro ĝi jam dum la nokto, kiam ĉi tiu skribaĵo estas verkita, iĝas membro de NATO, kien Finnlando ne aspiras membriĝi.

▷ taj 10 jaroj la plej popularaj fakoj estis humanitaraj, sed lastatempe pli kaj pli oni elektas teknikajn specialecojn. Homoj komprenas, ke sen klero mankas perspektivo.

Nordio logas

Estonio estas malgranda lando. Populaciaj procezoj signifas por ni ekzistadajn problemojn. Dum soveta tempo minacis nin danĝero fariĝi minoritato en sia propra lando. Eble nia sperto, kiel pace kaj sen malamo vivi unu apud alia, se la nombro de alinaciuloj superas la kritikan limon, estos utila en EU. Ĉiuj kiuj deziras bonan al Estonio devus kompreni, ke estas bezonate haltigi troan kaj plian diferenciĝon de vivnive-

Ni verŝajne pretas bonvenigi estonojn kaj aliajn baltojn al koncepto de Nordio, sed el historiaj kaŭzoj estas iom da kultura limo tie intere. Nordion kunigas ŝtata, lingva kaj kultura kuneco de jarcentoj. La historion flanke de Skandinavio kaj Finnlando karakterizas la ŝtatoj de Danio kaj Svedio, al kiuj apartenis ankaŭ Finnlando kaj Norvegio dum jarcentoj.

Flanke de Baltio la historio estas multe alia. Diversaj partoj de Baltio apartenis al ŝtatoj de Svedio aŭ Danio nur intertempe. Anstataŭe la baltajn regionojn kutime regis germandevena kulturo. Heredo de la diversa historio estis, ke dum la 19a jarcento, kiam Finnlando kaj Estonio ambaŭ estis partoj de la Rusa regno, Finnlandon regis svedlingva nobelaro, Estonion germanlingva.

Nuntempe ni vidas spurojn de la historiaj ligoj en alfabetoj. La estonoj skribas, kiel germanoj, per ŭ por la sono, kion finnoj kaj skandinavoj esprimas per y. Kaj ni finnoj havas en alfabeto la svedan leteron å, kvankam ĝi ekzistas en praktike neniu finnlingva vorto.

Mikko Mäkitalo, på något språk från Åbo

loj. Estas bezonata moderna sociala kaj labormerkata politiko. Por tio ke malpliigi tension en la socio estas bezonate prizorgi, ke ekfunkcius civitana socio.

Al plejmulto el estonoj plaĉus socia modelo de nordio. Ĝis tio ni havas longan vojon. En iu filatelista katalogo eldonita en Germanio Estonio estas klasifikita kiel lando – nordia, sed tio ne signifas, ke ni jam vere sociale apartenas al nordio. Ni paciencas esperas, ke pli bonaj tempoj estos antaŭe. La sorto kaj estonto de nia lando kaj nacio estas gravaj por ni.

*Tõnu Hirsik,
prezidanto de Esperanto-Asocio
de Estonio*

Historia laborgrupo eklaboris

Laŭ la decido de la estraro de EAF estis fondita historia laborgrupo, kiu nun komence konsistas el Mikko Mäkitalo, Jukka Pietiläinen kaj la subskribinto. Mikko Mäkitalo ĉefe okupiĝas pri la historio de FEJO. La estraro nek definitive fiksas la konsiston nek detale difinis la taskojn de la grupo, sed en nia unua kunveno, la 17-an de februaro en Tampere, ni ĝenerale diskutis, kio indas, endas kaj eblas. La ekinteresiĝo pri historio parte devenas de la alproksimiĝo de la 100-jariĝo de EAF. Estus ege bone, se ni povus havi libroforman historion de la finnlanda Esperanto-movado okaze de la datreveno, sed ni konscias, ke ni ne povas esti certaj pri tio. Almenaŭ endas havi tiam ian tutecan rigardon al la historio.

Ni scias, ke ekz. Erik von Hertzen jam faris grandan kaj valoran laboron ordigante la materialon, kiun EAF ricevis el la postlasaĵo de Vilho Setälä. En loka nivelo la situacio estas iom pli bona. Presitaj aperis ĝis nun historio-libretoj en Iisalmi, Oulu, Tampere kaj Turku. Krom ili en presita formo ekzistas nur kelkaj vastaj artikoloj de Esperanta Finnlando.

Por prilabori historion necesas unue klopodi klarigi, kiujn materialojn oni havas, kie ili haveblas kaj kiel oni povus utiligi ilin. Due necesas kolekti laŭbezzone novan materialon. Sekve oni devas decidi, kian materialon endas kaj indas konservi, kie kaj en kia formo. Poste oni povos verki trarigardojn aŭ eĉ libron pri la movada historio.

Ni scias, ke ekzistas diversa materialo utiligebla: Protokoloj, oficialaj dokumentoj, libroj, gazetoj, leteroj, fotoj, surbendigoj ktp. Grava materialo troviĝas en la oficejo de EAF, en ĝia stokejo, en arkivoj, ĉe lokaj kluboj kaj ĉe unuopaj esperantistoj. Sed certe estas multe da bona materialo, pri kies ekzisto ni ne scias. Por klarigiti, ni en la laborgrupo bezonas helpon de la lokaj kluboj kaj unuopuloj. Ĉiuj ideoj pri inte-

resaj materialoj estas bonvenaj. En Finnlando funkciis dekoj da diversfakaj kaj -lokaj Ekluboj, kies iama ekzistado kaj agoj minacas forgesiĝi. Same indus scii pri diversaj personoj, aranĝoj kaj okazaĵoj en la lando. Escepte malmulte oni scias ekz. pri la movado dum la jaroj 1924-40. Unu maniero kolekti materialon estas intervjuoj de maljunaj aktivuloj kaj iliaj propraj memorskribaĵoj. Kvankam tia memorado verŝajne ne plu multe povas prilumi la agadon antaŭ la dua mondmilito, la laborgrupo volas tamen kuraĝigi lokajn klubojn kaj unuopajn esperantistojn al memorado.

Kolektante sciojn pri diversaj materialoj la laborgrupo ne celas havigi ilin al la posedo de EAF, sed unue pritaksi ilian gravecon kaj laŭbezzone utiligi ilin. Posta afero estas pensi, kiel konservi gravajn dokumentojn. Ankaŭ tie ekzistas pluraj alternativoj. Multe da materialo certe jam perdiĝis kaj detruigis. Por laŭeble eviti tion poste, ni kaptas la okazon alvoki ĉiujn esperantistojn klopodi prizorgi pri tio, ke iliaj personaj Esperanto-materialoj ne senkontrolde detruigu post forpaso, ĉar kie ajn povas ekzisti la sola restanta ekzemplero de certa dokumento, libro ktp, kiu povas esti valora eĉ en tutmonda senco. Historio de finnlanda Esperanto-movado havas ja sencon ankaŭ en internacia skalo.

Oni povas aserti, ke studi historion estas vane kiam la asocio mankas fortojn por perfekte prizorgi ĉefajn verajn agadkampojn: informadon kaj instruadon de Esperanto. Vere, sed studante la historion oni ja povas klerigi la membraron, por ke ĝi sciu, kio okazis ĝis nun. La historio ĉiam instruas – aŭ ĝi devus instrui.

Pri historiaj materialoj kaj scioj do ne hezitu kontakti kun la grupanoj.

Por la laborgrupo,

Jukka Laaksonen

adr. Orimuskatu 79 B 4, 33580 TAMPERE

tel. (03) 2554 724, 050 5829 248

Vintraj Tagoj: el historio al freŝa vento ĉe UEA

Meitähän oli paljon!

Ĉi-jaraj Vintraj Tagoj de EAF okazis en Jyväskylä 13.-14. de marto en Kristana Instituto de Jyväskylä. Ĉe-estis ĉ. kvardek partoprenantoj de Taivalkoski ĝis Kimito-insulo.

La unua programero estis vizito en la funkci-ejo de la gazeto "Keskisuomalainen". Nian viziton zorgis bonege kaj sperte la ĉarma, juna virino Terhi Vallas. Ŝi post la kafumo prezentis la modernan gazeton al ni. Dufoje mi kaj eble kelkaj aliaj aŭdis la orajn vortojn spontanajn de



Terhi Vallas, kiu gvidis nin en redaktejo de Keskisuomalainen, ricevis donace libron Kalevala kaj numeron de nia gazeto.

nia ĉiĉerono: "Teitähän on paljon!". Bedaŭrinde ni havis nur unu horon por tiu ĉi programero.

La sama buso, kiu veturigis nin al "Keskisuomalainen", veturigis nin ankaŭ al Kristana Instituto por lunĉo kaj loĝiĝo.

Konservu historion kaj tuŝu teknikaĵojn

Je la 14a horo laŭprograme bonvenigis nin Anna Ritamäki. Antaŭ la unua kafopauzo ni aŭskultis vortojn de Jukka Laaksonen, kiu estas ĉefo de nova laborgrupo pri historio. Evidentiĝis ke neniu zorgos pri la konservado de niaj gravajoj historiaj se ne ni mem tion faros. Kaj aparte interese estus iam trovi aĵojn pri la vojaĝo de Zamenhof tra Finnlando post la ne okazinta Pariza kongreso. Fakte la vojaĝo ja okazis, sed mankas ankoraŭ pruvoj pri tio.

La historia grupo (Jukka Laaksonen, Jukka Pietiläinen kaj Mikko Mäkitalo) ĵus komencis sian laboron kaj almenaŭ mi certas ke la laboro de la grupo estos utile ne nur al nia movado sed ankaŭ al la tuta historia esplorado en Finnlando, ĉu homoj ekster esperantistaro konsideras esperanton kiel kulturon aŭ ne.

Ni ĉiam alttaksu nian kulturon!

Post la kafopauzo kaj la dua parto pri historio havis FEJO, ELFI, KELF ktp. siajn kunsidojn. Kaj estis ankaŭ akcepto de la asocio Nino Runeberg.

Je la 19a ni vespermanĝis kaj societa bazaro pretis je la 20a horo. Sukcese, kaj nia sperta teknikuŝanto Tuomo certigis ke ne tro mallonge.

Se bezonate, ni ĉiam tuŝu la teknikaĵojn!

Al la vespera programo apartenis en la urbocentro la koncerto de la mondfama rokbando Dolchamar kaj la teatraĵo pri Kalle Päätalo. Ili ambaŭ vizitindis laŭ tiuj kiuj ilin aŭskultis kaj rigardis.

Suno ridetas ankaŭ por UEA

La dimanĉa mateno sune komencis rideti kiel mendita. Post matenmanĝo preĝemuloj havis sian propran programeron. Laŭstatuta ĵarkunveno de EAF komencis je la 10a horo. Kaj glate iris la kunveno, senkverele, preskaŭ unuanime, enhavante multajn gravajn kaj eĉ saĝajn parolvicojn.

En la postlunĉa prelego Osmo Buller prezentis temon "Trapasaj perspektivoj inter Päätaloinstituto kaj UEA". Ni havis bonegan okazon rimarki kiel UEA iom post iom fariĝas asocio de ĉiuj pensemaj esperantistoj. Ene de la asocio nun diskuteblas kaj disputeblas ree pri kiu ajn temo aktuala kaj ni rimarkas kiel leviĝas libera vento denove por veladi trankvile sur La Esperanta Maro.

Ni ĉiuj estu ree individuaj membroj de UEA!

Kaj menciindas ankaŭ ke Aganto de la jaro 2003 fariĝis nia Saliko, Raita Pyhälä, pro sia grava laboro por esperanto pere de skribado kaj instruado en Finnlando kaj ankaŭ internacie dum la 2003a jaro. Gratulegojn.

Post adiaŭa kafo kaj varmaj adiaŭaj vortoj de nia re-elektita prezidanto Anna ni revenis hejmen.

Markku Saastamoinen

PS. Hollantilainen huippututkija Manfred Kets de Vries pitää suomalaisia maailman parhaimpina yritysjohtajina. Joten ei liene epäilystäkään siitä, että UEA on vastedes hyvin johdettu kansainvälinen järjestö. Olkaamme aktiivisia UEA:n jäseniä. Aktiivisuutemme on paras tuki Osmolle!



La nova estraro de EAF en ordo laŭ graveco: En antaŭa vico la gvidantaj inoj (el dekstre) prezidanto Anna Ritamäki, sekretario Tiina Oittinen kaj vicprezidanto Päivi Saarinen. En malantaŭa vico la obeemaj viroj (el dekstre) estraranoj Markku Saastamoinen, Tuomo Grundström kaj Taneli Huuskonen kaj vicestrarano Timo Pirinen. (Mankas de la foto estrarano Auli Vihermä kaj vicestraranoj Raita Pyhälä kaj Eero Rinta-Karjanmaa.) Plej antaŭa de ĉiuj aliaj estas la plejgravulino Aura.

La Nordia vintro

La preteksto

En 2002 mi feris januare. Ankaŭ en 2003. Estas tute facile konvinki la ĉefon de la firmao, ĉar neniu oficisto pretendas pri januaro. Krom mi. Sekve mi estis la unua en la feria kalendaro, kaj tion oni akceptis sen miro. Tamen, kiam en februaro 2003 mi ekpretendis esti la unua ankaŭ por 2004, la ĉefo esprimis mireton.

”Vi povas argumenti, certe, ke vi ne ŝatas varman bieron kaj ŝvitajn virinojn”, li diris, ”sed estas ankaŭ pli serioza kaŭzo, ĉu ne?”

”Jes”, mi respondis, ”Esperanto.”

En 2002 mi turneis en Germanio. En 2003 en Francio. Aperis bona preteksto provi por 2004 Nordion. La Internacia Festivalo (IF), kiun mi kutime partoprenas dum jarŝanĝo, devis okazi ĉi foje en Kiel, la urbo pli-malpli proksima al tiu mondregiono. Mi arogis peti helpon de HDP (Hans-Dieter Platz, la organizanto de IF) kaj tiu faris la proponon al Wim Posthuma (Svedio) kaj al Tiina Oittinen (Finnlando). Kun sincera dankemo mi raportu, ke ambaŭ konsentis esti kunordigantoj de la turneo.

Certe, mi havis antaŭtimon. Unuavice, esti nekomprenebla de la neesperantistaj aŭskultantoj – ja laŭplane mi devus multloke paroli por junularo! Duavice mi sentis antaŭtimon pro ŝarĝiteco de la kalendaro de mia turneo. Vizitis min eĉ troa hezitemo kune kun la deziro retiriĝi, rezigni la planon. Sed la organiza rado jam ekfunkciis, pluraj urboj anoncis sian deziron akcepti min... Ĉiujn miajn hezitojn kaj timojn do mi devis forĵeti en rubujon kaj akcepti tion, kion prezentos ”kaprica damo Destino”.

Haste laŭ la mapo


La ekiro estis ne bona. La neĝoŝtormo, furiozinta matene, la 25-an de decembro, kaŭzis enorman kvanton da paneoj kaj akcidentoj en la ŝoseo Tiĥvin–Peterburgo. Ankaŭ la aŭto de mia amiko, portanta min, ne evitis. Nenio terura

tamen okazis – nur la kurta ektimo – sed la duonhora helpatendo en la sendifekte renversita aŭto tamen kaŭzis mian malfruigon al la buso, foririnta Germanion sen mi. Nu, la komplezema busfirmao trovis por mi lokon en la sekvataga buso, kaj per tio finiĝis la kapricoj de mia Destino.

La tuta komplika itinero inter Peterburgo kaj Peterburgo pasis senprobleme, dank’ al zorgoj de multaj homoj. Miajn zigzagoj sur la mapo, bonvolu: Peterburgo - Berlino - Kiel - Travemünde - Trelleborg - Gotenburgo - Helsingborg - Malmö - Kopenhago - Malmö - Västerås - Stokholmo - Turku - Rauma - Keuruu - Jyväskylä - Tampere - Lempäälä - Kimito - Helsinki - Lahti - Lappeenranta - Peterburgo. Kvardek ses horojn perbuse ĝis Berlino. La eventoriĉa semajno de la IF en Kiel. Kaj poste mem la turneo inter la 5-a kaj la 31-a de januaro. Nun, post semajna hejma ripozo, forvaporiĝis tiu postturnea elĉerpiĝo; restis nur la fiero certeco pri la propra organismo, kiu dume ne protestas kontraŭ similaj aventuroj.

”Saluton, gento juna, nekonata!”

En citiloj, ĉar diris ne mi, sed Aleksandr Puŝkin antaŭ du jarcentoj. Tamen enanime mi ripetis tiun frazon ĉiufoje, irante al la prezentadoj por eksterespa publiko, por junularo. Kaj tiuj ja multis, ĉiam provokante antaŭtimon, kompensatan per la kontento okaze de evidenta sukceso. Sumigante la kvantojn de gejunuloj, kiuj aŭdis miajn rakontojn pri Rusio, pri Esperanto, pri poezio, – en lernejoj, gimnazioj, altlernejoj kaj bibliotekoj de diversaj urboj, – adiciante ne tro junaĝajn aŭskultantojn, i.a. en la maljunulejo de Lempäälä (tre ĉarma kvindeko da geavoj!), mi venas al la proksimuma kvanto de ĉ. 750-800 personoj. Se almenaŭ dekonon el ili eklernus esperanton – jam bona rezulto! Sed, eĉ se ne, mi estas kontenta, ĉar la publiko montris sin atenta kaj



Dum siaj lernejoj vizitoj Mikaelo kantis kaj kantigis en multaj lingvoj. Maldekstre rusa kanto skribita per latinaj literoj. (Fotis Carolina Antskog)

scivolema.

Ĉiuloke venadis multaj demandoj diverstemaj, foje igantaj min skrapri la nukon embarase. La aŭskultantojn interesis la rusa vivo, la rusa kulturo, la vastiĝo de Esperanto en la Reto, la enesto de langorompaj frazoj en Esperanto. Mi devis tuj elpensi tiujn por pravigi la jesan respondon!

Mi eĉ ne povis imagi, ke en Skandinavio regas tioma estimo, amo, adoro al la bardo esence plej rusa, al Vladimir Visockij, sed ja efektive ĉeestas tiu fenomeno! Post mia prezentado de Visockij-kantoj en unu el la aŭditorioj okazis diskuto eĉ kun interkvereleto pri la kvalito de finnlingvaj tradukoj el Visockij. Dum la dekminuta diskuta ardo mi estis komplete forgesita kaj nur mire gapis al la evoluo de la evento...

La plej neatendita demando venis en iu finna gimnazio. Fraŭlino el la dudeko de gejunuloj

petis ke mi kantu la rusan himnon. Estis granda embaraso por mi, ĉar la nuntempa himno de Rusa Federacio havas la melodion de la iama Sovetia himno, kaj mian kapon ja estas enmarteligitaj la vortoj ĝuste de tiu Sovetia, ne de la Rusia! Mi klarigis tion al la aŭskultantoj, sed ili estis pretaj aŭdi eĉ la Sovetian, do mi kantis... Reciproke, la geknaboj ekstaris, metis la dekstrajn manojn sur la brustojn kaj kantis por mi la himnon de Finnlando.

”Ha, mi aŭdis tiun ĉi melodion”, mi diris, ”Ŝajnas, ke post iu grava venko de la finna glaciĥokea teamo...?”

”Nia finna teamo estas la plej forta en la mondo!” kriis kelkaj knaboj.

”Permesu al mi resti ĉe iom alia opinio?” mi petis, kaj ili permesis...

Miaj inspirantoj

Estis, certe, esperantistoj, kiuj dum la tuta itinero subtenis min ne nur per varmo de la animoj, sed ankaŭ per refreŝiga duŝo aŭ eĉ saŭno, per komforta lito, per bongusta manĝo k.t.p.

Vizitinte (krom la IF kun ties ĉ. 200 partoprenantoj el 22 landoj!) dek du kunvenojn de lokaj Esperanto-grupoj, kluboj kaj asocioj, mi trovis kelkcentan kompreneman kaj bonkoran publikon, kiu laŭesence estas mia publiko, la verda popolo, por kiu mi verkas kaj kantas. Tie, en la kunvenoj tute mankis timo, sed estis deziro montri al miaj karaj geaŭskultantoj la plejbonon el tio, kion mi produktis dum la lastaj jaroj. En la esperantistaj kunvenoj mi salutis la malnovajn geamikojn kaj akiris amason da novaj. Kelkajn klubojn mi jam estis vizitinta antaŭ dek jaroj, en 1994. Komparante la malnovajn fotojn en la klubaj albumoj kun la nuna realo, mi konstatis kun sopireto, ke la koloro de mia barbo katastrofe rapidas de la bruna al la blanka, kaj ke ankaŭ miaj geamikoj akiris kelkajn sulkojn... Tempo flugas sen lasi nin junaj...

Esperantistoj en multaj urboj estis inspirantoj ankaŭ de mia prezentado pere de lokaj amaskomunikiloj. En Västerås la aŭto de loka radio venis al la domo, kie loĝas Wim Posthuma por ▷

Sinfoniaa esperantoksi

David Gaines: Euphonium Concerto. Symphony No. 1 ("Esperanto") Moravian Philharmonic joht. Vit Micka. Sol. Kimball Wheeler.

Kirjoituksessa käsittelen vain Esperantosinfoniaa. Teoksessa on neljä osaa. Yhdeksi instrumenteista voidaan lukea myös ihmisääni jota säveltäjä on käsitellyt sinfonisin keinoin.

1. osa alkaa kuin tuulen tuomana. Puhallinsoolot esittäytyvät, ne käyvätkin kautta koko sävellyksen mielenkiintoista keskustelua. Solistiosuuden teksti on Zamenhofin avajaispuhe v. 1910 esperantokongressissa Washingtonissa. Säveltäjän näkemys on mietiskelevä, julistava tunnelma tulee vasta lopussa. Solistina laulava tumma-ääninen mezzosopraano Kimball Wheeler tulkitsee ammattitaidolla vaikeihin intervaleihin perustuvat soolo-osuudet kautta koko sävellyksen. Äänitystekninen toteutus on hyvä, laulajan ääni ei häviä orkesterin peittoon. Levyn mukana seuraava teksti selventää sooloja tarvittaessa.

2. osan tekstin on kirjoittanut Dr. Marjorie Boulton v. 1956. Teksti on dramaattinen ja julistava. Orkesterin rytmin käsittely on rikasta ja elävää, eri soitinryhmillä on mielenkiintoista, jopa tanssillista vuoropuhelua solistin kanssa.

3. osan runon on kirjoittanut Penka Papazova v. 1984. Tämä sinfonian hidas osa on sointiväriään kaunis ja salaperäinen. Alun instrumentaalijohdanto saa synkempiä sävyjä solistiosuuden alkaessa. Mielestäni runon sisältö on valoisa, säveltäjän näkemys on kuitenkin alakuloinen, jopa synkkä.

4. osan teksti on säveltäjän oma. Musiikillisesti osa on yhteenveto aiemmasta ja on yleis-tunnelmaltaan julistavin, puhaltimilla on fanfaareja, rummuilla melkein sotilaallisia rytmejä. Tempot vaihtelevat ja rytminkäsittely on rikasta. Orkesterin ja solistin vuoropuhelu päättyy voitokkaaseen loppuun, musiikki muuttuu kuitenkin tunnelmaltaan arvoitukselliseksi ja katoaa jonnekin kaukaisuuteen.

Ne, jotka eivät ole tottuneet kuuntelemaan

▷ aranĝi rektan radioelsendon. Pri la sukcesa poramaso koncerto, organizita de Wim en la urba koncertejoj (partoprenis Duo Diverslingve, Olesja Bertse, Kaj Stridell kaj mi) aperis kelkaj anoncoj kaj granda artikolo en loka ĵurnalo. Grandaj kaj bonkvalitaj artikoloj aperis ankaŭ en Rauma (kulpas Tuomo Grundström) kaj en Kimito (kulpas Anna Ritamäki). Notindas, ke la artikoloj estis publikitaj en la paĝo pri kultura vivo kaj anstataŭ truda propagando prezentis rakonton pri la persono, kiu vivas kaj verkas ĉefe en Esperanto-medio.

Mi tutkore dankas miajn afablajn gastigantojn – HDP, Ralf, Ann-Louise, Asta, Iliana, Wim, Nataŝa, Ĵomart, Tiina, Paula, Aimo, Seija, Sylvia, Carola, Taneli, Martti kaj Jorma. Sed mi estus tute maljusta, se mi forgesus diri mian tut-

koran dankon ankaŭ al la edzoj/edzinoj de la nomitaj miaj geamikoj, al la aro da amikoj/amikinoj, kiuj mian nemultan liberan tempon faris rava travivaĵo per ekskursoj kaj promenoj, per agrablaj konversacioj ĉe manĝotablo, kiuj sincere aplaudis dum miaj koncertoj.

En unu gimnazia klaso simpatia fraŭlinjo faris al mi la plej komplikan demandon: ŝi petis mian opinion pri la senco de mia vivo. Al la legantoj mi diru veron, ke mi ne scias la respondon. Tamen al la fraŭlinjo mi respondis ion tre proksiman al mia ebla opinio. Mi diris, ke mi volas esti komprenita de homoj.

Ŝajnas al mi, ke almenaŭ dum la Nordia turneo mia vivocelo efektiviĝis.

*Mikaelo Bronŝtejn,
Tihvin, 07.02.2004*




Säveltäjä David Gaines.

modernia konserttimusiikkia, joutuvat varmasti hämmentävään tilanteeseen. Sävellys on vaikeasti lähestyttävä, esperantonkieliset sooloosuudet monimutkaisia ja etäisiä. Laulusolistin ääni on tummuudessaan hieman kolkko, orkesterin sointivärit ja rytmit vaikeita hahmottaa. Konserttitilanteessa saattaisi olla helpompi sisäistää kokonaisuus, levyltä kuultuna jää paljon mielikuvituksen varaan. Sinfonia avautuu ammattilaisellekin vasta useiden kuuntelukertojen jälkeen.

*Arja Lyly,
musiikinopettaja,
Director musices, Turku*

Levyarvostelun kirjoittaja Arja Lyly on Turun Esperanto-yhdistyksen jäsen. Hän on käynyt Someron yhteiskoulua Joel Vilkin aikana ja lukeutunut pakollisena aineena esperantoa, kuten siinä koulussa silloin oli tapana.

”Jälkeenpäin olen huomannut, että kieliopin perusasiat ovat tulleet selkeänä pakettina ja se on ollut hyvä pohja muitten kielten opiskelussa. Myös sivistyssanat tulivat sivutuotteena tu-



DAVID GAINES

Euphonium Concerto

Symphony No. 1
("Esperanto")

Kimball Wheeler
mezzo-soprano

Jiří Vydra
euphonium

Moravian Philharmonic
Vít Mická

MMC
RECORDINGS

tuiksi jo varhain samoin kuin jännittävien kansainvälisten kontaktien luominen”, Arja Lyly kertoo. Someron yhteiskoulun humaani kasvatusta ja korkean yleissivistyksen korostaminen on ollut ylpeyden aihe oppilaille ja antanut vankan pohjan elämälle. Eri taiteen aloilla onkin paljon tuon koulun kasvatteja.

Arja Lyly on toiminut musiikinopettajana sekä usean kuoron ja orkesterin johtajana. Hän on säveltänyt kuoro- ja soololauluja, viime mainituista eräs viehättävimpiä on Kesävalssi Aurajoen rannoilta. Se ja pari hitiksi tullutta lasten laulua löytyvät Lauluja Turusta -laulukirjasta, jonka tuotantoprojektissa Arja Lyly oli mukana. Heleä-äänisenä trubaduurina ja säestäjänä hän on ollut luomassa nautinnollisia musiikkielämyksiä myös Turun Esperanto-yhdistyksen järjestämässä tilaisuuksissa (v. 1995 esikongressin Suomi-ilta, laulelmatuokio Cafétorissa, yhdistyksen 40-vuotisjuhla, kuukausikokoukset, joulujuhlat). Arja Lyly on Turun Laulelman Ystävät -yhdistyksen jäsen ja toimii myös useissa muissa yhdistyksissä. Director musices -arvonimen hän sai ansioistaan vuonna 1992.

Anna-Liisa Ali-Simola

Roman Dobrzynski: La Zamenhof-strato

286 p., Ryto varpas, Kaunas 2003

La libro de R. Dobrzynski rakontas ne nur pri la Zamenhof-strato de Varsovio, nek ekskluzive pri la centoj da samnomaj stratoj en la mondo. Ĝi rakontas pri la sorto de Esperanto, pri ties vojo tra la mondo kaj la historio, ĝi rakontas pri la sorto de la Zamenhof-familio kaj precipe pri la vivo kaj laboro de doktoro Ludoviko Kristoforo Zamenhof, kiu nuntempe vivas siajn 80-ajn jarojn kaj kies saluton oni aŭdas en Universalaj Kongresoj kaj aliaj gravaj Esperanto-eventoj. (Li estas inĝeniero, kiu specialiĝis pri prembetono, konstruado de pontoj kaj de tegmentegoj.)

La verkado de la libro daŭris dekon da jaroj. Unue ĝi aperis en pola lingvo kaj poste en Esperanto, sed la esperanta eldono estas ne nur simpla traduko de la pola sed pliĝustigita kaj plibonigita. Rimarku, ke ĝin faris la verkisto mem. Ĝi estas skribita kvazaŭ intervjuo, laŭ interparoloj de L.K. Zaleski-Zamenhof kaj la verkisto, sed ne dum unu sesio oni povus ĉion tion demandi kaj noti. Verdire la libro baziĝas sur multa interparolado dum deko da jaroj, sur kunaj vojaĝoj, sur leteroj, telefonvokoj kaj verk-

aĵoj, kaj ĝi pritraktas ne nur la paseon de Esperanto sed la nunon kaj futuron.

La virtuala Zamenhof-strato kondukas al kaj tra multaj nunaj problemoj: nuklea armilaro, poluado, naciismo, enmigrado, terorismo, nar-kotindustrio, ekumenismo, homaj kaj lingvaj rajtoj, tradukkkostoj ĉe Eŭropa Unio, kaj aliaj. Laŭ Zaleski-Zamenhof la universala fundamento, sur kiun ni povus konstrui nian futuron, havas tri pilierojn: libereco, egaleco, frateco, kaj la du viroj en la lastaj ĉapitroj de la libro longe parolas pri ĉio tio. Ilia prioritata tasko estas indiki la ekziston de la problemoj, ne ties solvon. (Kompreneble, al lingvolernanto la libro instruas, kiel paroli pri la problemoj en Esperanto.)

La Zamenhof-strato svarmas per faktoj, nomoj, datoj, nombroj. Feliĉe ĝi havas bibliografi-ajn indikojn post la ĉapitroj kaj liston pri la menciitaj homoj, kun indikoj de la paĝoj, en la fino.

Zlatko Tišljariĉ diras pri la libro de Dobrzynski, ke li ne scias, ĉu pli interesaj estas demandoj aŭ respondoj, kaj Humphrey Tonkin nomas la stilon glata kaj legebla. Mi samopinias kun ambaŭ. Kelkfoje tamen min dubigis la esprimo "manki ion" anstataŭ "al iu mankas io". Ĝuste tia libro kia *La Zamenhof-strato* mankis al mi sed ne plu. Mi ne bedaŭras, ke mi aĉetis ĝin.

Saliko

Nova reta Katalogo de UEA

Post plurmonataj preparoj estas malfermita por publika aliro la nova reta Katalogo de UEA: <http://katalogo.uea.org>

La nova Katalogo regule prenas la informojn el la datumbazo de la Libroservo de UEA kaj aŭtomate respegulas ŝanĝojn en ĝi. Interalie, oni tuj vidas, ĉu iu libro estas havebla aŭ jam elĉerpigis.

La testintoj, partoprenintaj en la lasta etapo de la preparlaboroj, trovas ĝin oportuna kaj facila por la uzado. Oni povas serĉi la varojn ne nur per la titoloj, la aŭtoraj nomoj kaj kategorioj,

sed vokinte "aldonajn serĉkriteriojn" ankaŭ per la titolo de la eldonejo, vortoj en la priskriboj, lingvo, eldonjaroj kaj eĉ intervaloj de paĝonombroj kaj prezoj. Unika servo de la Katalogo estas reta abonejo por la perataj de UEA E-gazetoj.

(el komunikado de UEA mallongigis mm)

Korespondi deziras

Korespondi pri ĉiaj temoj deziras Jonas Petr, Listopadu 17, 57001 Litomyšl, Ĉeĥio.

Raita Pyhälä aganto de la jaro 2003

”Laŭ decido de Esperanto-Asocio de Finnlando Raita Pyhälä, alinome Saliko, estas nomumita *Aganto de la jaro 2003* pro ŝia multflanka kontribuo al la esperantomovado per instruado, verkado, tradukado kaj entuziasmigo de siaj kunmovadanoj. En 2003 ŝi interalie instruis en Greziljono tie konatigante Finnlandon kaj reveninte konatigante la esperantocentron nialande kaj internacie per artikoloj. Ŝi plurflanke subtenas junajn esperantoparolantojn, interalie kiel juĝanto de la fabelkonkurso de Päätaalo-instituto kaj kunlaboranto de la revuo Juna Amiko. Saliko estas ĉiujara aganto!

Kiel instigon al plia kleriĝo kaj agado EAF premias ŝin per la baldaŭ ĉe UEA aperonta libro *Ĉu nur-angla Eŭropo?* (Robert Phillipson, traduko István Ertl), kaj unu plia libro, laŭ ŝia elekto, de la libroservo de UEA.”

La nomumon anoncis la prezidanto en la jarkunveno en Jyväskylä la 14an de marto. Raita ne povis mem partopreni la okazon, sed la prezidanto povis anonci ke Raita kun granda ĝojo akceptis la informon pri la nomumo. La aganto de la jaro ricevis la diplomon poŝte.

(mm/amr)

Subvencioj por eduki E-instruistojn en Afriko

En aprilo 2004 unuafoje estos disponigataj subvencioj de la nova fondaĵo ”Hans”, kreita pasintjare por subteni la edukadon de novaj Esperanto-instruistoj en Afriko. La fondaĵo estis starigita memore al Hans ten Hagen (Nederlando 1932-2003). Ĝian komencan kapitalon – 100 mil eŭrojn disponigis nederlandaj familioj ten Hagen-Renses kaj Bakker-ten Hagen.

La regularon de la fondaĵo ”Hans” oni povas trovi en la retejo *uea.org*, parto ”Dokumentoj”.

(el komuniko de UEA prenis mm)

Subteno por grava reta projekto

La estraro de UEA unuafoje decidis doni aŭspicion por reta projekto. La informan kaj moralan subtenon de la Asocio havos volontula grupo, gvidata de Tim Morley, kiu celas esperantigi la programaron *OpenOffice.org*.

Sekvas klarigoj pri *OpenOffice.org* kaj la agado pri ĝia esperantigo, preparitaj de Tim Morley:

OpenOffice.org estas nekomerca, senpage distribuata programaro, kreata kolektive de volontulaj programistoj. Laŭ funkcioj ĝi estas tre simila al la konata oficeja programaro de Microsoft, t.e. Word, Excel, PowerPoint, ktp. Ĝi povas funkcii en pluraj operaciaj sistemoj, inkluzive Vindozo kaj Linukso.

Interesiĝantoj povas elŝuti la programaron el *www.openoffice.org* aŭ aĉeti KD-on kontraŭ malgranda sumo ekz. ĉe la ”Linux Emporium” (<http://www.linuxemporium.co.uk/products/applications/#pid4523>).

La laboro estas ege granda, sed la efiko, kaze de sukceso estus vere signifa. Por sukcesigi la projekton oni bezonas pli da volontulojn.

Por tio oni serĉas personojn, kiuj:

- ♦ kapablas kompetente skribi en Esperanto
- ♦ komprenas la anglan, ĉefe la prikomputikan anglan
- ♦ havas komputilon (aŭ Vindozon, aŭ Linuksan)
- ♦ kapablas instali programo(j)n en la komputilo
- ♦ havos kelkajn horojn ĉiusemajne dum iom da tempo
- ♦ deziras helpi esperantigi la programaron *OpenOffice.org*

Des pli bone se ili ankaŭ:

- ♦ havas grandtraigivan konekton al interreto
- ♦ havas Novan PIVon, grandan (teknikan) vortaron anglan/Esperantan
- ♦ jam tradukis programojn
- ♦ jam uzis poEdit aŭ KBabel
- ♦ povas/scias uzi grep
- ♦ havas multe da libera tempo (!)

Tamen tiuj lastaj petoj estas deziretaĵoj, ne bezonaĵoj. La sinanoncojn oni sendu al la adreso *reto@uea.org*

(el komuniko de UEA prenis mm)

Informoj pri la 40-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40)

BET-40 okazos en urbeto Birŝtonas (4300 loĝantoj), 40 kilometroj for de Kaunas kaj 90 kilometroj for de Vilnius apud ĉefa rivero de Litovio Nemunas, en centro de regiona nacia parko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. Ĉefa lokalo de BET-40 estos sanatorio Versme, atingebla buse kaj aŭtomobile. Kontraŭ aparta pago eblos uzi diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn de la sanatorio. Eblos rajdi per ĉevaloj, veturi per ĉaro, lui biciklojn, boatojn k.s.

Tempo: La 10-18-an de Julio, 2004. Alveno eblas jam la 9-an de Julio. **Antaŭ BET-40** la 3-10-an de Julio en Litovia apudmara urbo Kretinga okazos vica la 57-a kongreso de IKUE.

Aliĝkotizo: 60 lidoj por okcidentanoj (malpli por loĝantoj de ekssocialismaj landoj). Infanoj kaj gejunuloj ĝis 16-jaraj aliĝkotizon ne pagas. Lernejanoj kaj studentoj pagas duonon de la baza kotizo. Unu eŭro egalas al 3,45 lidoj.

Loĝado: ekzistas kelkaj eblecoj:

1) en dultaj ĉambroj de la sanatorio Versme. Unu nokto por unu persono 40 lidoj.

2) en unulitaj ĉambroj de la sanatorio. Unu nokto 70 lidoj.

3) en luksaj apartamentoj el du ĉambroj de la sanatorio. Unu nokto 55 ĝis 110 lidoj por unu persono.

4) en du kaj trilitaj ĉambroj de sportista komunloĝejo (duŝejo kaj necesejo en koridoro). Unu nokto por unu persono 20 lidoj.

5) eblas mendi ĉambrojn en urbaj hoteloj. Prezoj varias ekde 40 ĝis 150 lidoj por unu persono.

Manĝado: en manĝejo de sanatorio Versme organizite. Tri manĝoj tage. Eblos organizi vegetaran. Unutaga trifoja manĝado 35 lidoj (ĉirkaŭ 10 eŭroj).

Programo: tradicia, t.e. somera universitato, kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, scienc teknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, kvizoj, ekskursoj al vidindaĵoj, ripozado en naturo,



libroservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, gazeta konferenco, sportaj ludoj ktp. Enkadre de BET-40 okazos vica Balta Esperanto-Forumo.

Plena informilo kaj aliĝilo riceveblaj ekzemple de la ĉefredaktoro aŭ de LEA. Komence de Junio ĉiu aliĝinto ricevos Informilon Nr.2. Ret-adreso de LEA estas: <litova.ea@mail.lt>.

(el informilo kompilis mm)

Ŝanĝo de retroŝtaj adresoj

Por malgrandigi la kvanton de ricevitaj trudmesaĝoj tri esperanto.fi-adresoj nun ŝanĝas formon.

Bv. ne plu uzi la formojn *prezidanto*, *sekretario* kaj *mendoj* ĉe *esperanto.fi*. La novaj adresoj komenciĝas per eaf kaj estas *eafprezidanto@esperanto.fi* (atingas Anna Ritamäki), *eafsekretario@esperanto.fi* (atingas Tiina Oitinen), *eafmendoj@esperanto.fi* (atingas Päivi Saarinen). Por la ceteraj esperanto.fi-adresoj ne estas ŝanĝoj.

La malnovaj adresoj ankoraŭ funkcios paralele dum iom da tempo, sed jam nun ekuzu nur la novajn.

Jam antaŭe, pro la sama kaŭzo, ni enkondukis la adresojn *eafkasisto@esperanto.fi* kaj *eaflehti@esperanto.fi* (anstataŭ la malnova *esperanto-lehti*).

Suomen Esperantoliiton syyspäivät Iisalmessa 18.-19.9.2004

Kulttuurista ja savolaista hulluutta

Elämykselliset syyspäivät odottavat meitä Iisalmessa. Tällä kertaa tutustumme paikalliseen luontoon ja kulttuuriin esperantoa unohtamatta. Yöjunalla saapuvat ohjataan asemalta aamupalalle läheiseen Evakkokeskukseen, johon muutkin kokoontuvat. Aamiaisen jälkeen tutustumme kaupunkiin kiertoajelulla ja sen päätteeksi bussi kuljettaa meidät Runnin kylpylään, syyspäivien majoittumispaikkaan. Päivät avataan lounaan yhteydessä ja sen jälkeen on mahdollisuus tutustua Runnin palveluihin. Iltapäivällä lähdetään bussilla lomamökkikeskukseen, jossa on saunomisen lisäksi tarjolla monenlaisia ohjelmaa: mm. Halavatun Papat esittäytyvät. Esperantoksi meille laulaa ja tarinoi liettualainen lauluyhtye Asorti, joka viimeksi vieraili Suomessa pari vuotta sitten. Ehkäpä näemme myös Elenan ja Edwardin tekemän videon päivien aikana. Aidon savusaunan jälkeen on tarjolla iltapalaa, mm. savukalaa. Sunnuntaina käynti suuntautuu Lapinlahden maisemiin, jossa on tiedossa luonnossa kävelyä Väisälänmäen kansallismaisemassa, nuotiokahvit ja muuta viihdykettä. Lounaan jälkeen alkaa paluumatka varmasti monta kokemusta rikkaampana.

Tarkemmat tiedot ilmoittautumisesta, maksuista ja matkustustavoista ovat seuraavassa lehdessä, mutta varaa jo nyt viikonloppu kalenteriisi. Savolaisen kulttuurin ja hulluuden ryydittämät päivät ovat aina ainutkertaisia.

Tervetuloa!

*Iisalmen Esperantoklubi ja
Suomen Esperantoliitto*

Aŭtunaj Tagoj de EAF en Iisalmi 18.-19.9.2004

Kulturo kaj Savo-tipa frenezo

Kulturo en Savo-provinco enhavas ĉiam iom da frenezo, ĉu ne? En Iisalmi Aŭtunaj Tagoj ĉiam estas unikaj, tion certigas ĉiuj kiuj iam tie estis. Kaj nature volas veni denove. Iisalmi estas atingebla ekzemple per nokta trajno kaj tuj matene atendas matenmanĝo en proksima Evakkokeskus (centro de evakuitoj, historia nomo de la ejo). El la centro ekveturos buso por ĉiĉeronita rondveturo en la urbo kaj la sama buso veturigos nin al la banejo Runni, kiu estas nia tranoktejo. Post la malfermo de la tagoj ĉe la lunĉo estos en programo libera konatiĝo kun la servoj de la banejo. Vespere ni denove ekveturos al la proksima libertempejo, kie nin atendas multflanka vespero kun diversaj programeroj. Loka grupo Halavatun Papat (nomo netradukebla) montras sian talenton kaj esperante al ni prezentos programon la grupo Asorti el Litovio. Eble ni rigardos la videon, kiun Elena kaj Edward faris dum sia vizito en Finnlando antaŭ du jaroj. Kompreneble eblas saŭni en vera finna fumsaŭno kaj post tio estos regalata vespermanĝeto kun i.a. fumita fiŝo. Dimanĉe ni konatiĝos kun la pejzaĝo de Lapinlahti, kie ni vagados en la naturo de la nacia pejzaĝo de Väisälänmäki, kafumos ĉe la fajro ktp. Post lunĉo estos tempo komenci la hejmenvojaĝon kun multaj novaj spertoj.

En sekva Esperanta Finnlando estos detalaj informoj pri la aliĝo, pagoj kaj vojaĝeblecoj, sed rezervu jam la tagojn en via kalendaro. La tagoj kun kulturo kaj Savo-tipa frenezo estos travivaĵo, kiun vi ne maltrafu.

Bonvenon!

*Esperantoklubo de Iisalmi kaj
Esperanto-Asocio de Finnlando*

Oficejo, arkivo kaj biblioteko bezonas atenton en 2004

La jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazis dimanĉe la 14an de marto en la kristana instituto de Jyväskylä. Ĉeestis 36 personoj. 12 membrosocietoj estis rajtigite reprezentitaj. Kiel prezidanto de la kunveno elektiĝis Jukka Laaksonen, kiel protokolanto Seija Kettunen.

Anna Ritamäki estis reelektita prezidanto. Estraranoj por 2004-2005 estis elektitaj Taneli Huuskonen, Auli Vihermä (novaj) kaj Tuomo Grundström (vicestrarano 2003) kaj kiel vic-estraranoj por 2004 estis elektitaj Timo Pirinen (nova), Raita Pyhälä kaj Eero Rinta-Karjanmaa. En la estraro sen reelektito restas Tiina Oittinen, Markku Saastamoinen kaj Päivi Saarinen.

Kiel revizorojn estis elektitaj Erkki Kempainen kaj Jukka Laaksonen (nova) kaj kiel vicrevizorojn Seija Kettunen (nova) kaj Marja-Liisa Parpala.

Rilate al la financoj eblas konstati ke EAF sukcesis sufiĉe ekvilibre agi en 2003. La rezulto estis nur iom minusa: -289,77. Por 2004 EAF buĝetis pli minusan rezulton, -2000, laŭ ekzemplo de la antaŭaj jaroj. Tamen, pro la efiko de la komunikada projekto, estas verŝajne ke la asocio sukcesos pli bone ol buĝetite ankaŭ ĉijare.

Por la estraro (hoitokunta) de Fonduso Propra Ejo elektiĝis en la jarkunveno Anna-Liisa Heikkinen (nova) kaj Harri Laine. La fonduso ekzistas kadre de la bilanco de EAF. Ĝia estraro ne faris apartan raporton. La kunveno diskutis ĝian rolon en la nuna situacio kaj decidis ke la estraro petu raporton ĝis la sekva jarkunveno.

Lige al la pritrakto de la agadplano estis aparte elstarigita la graveco de laboro pri oficejo, arkivo kaj biblioteko. EAF invitas profesiulojn pri bibliotekaj aferoj kunlabori kiel konsilantoj. Diskuto okazis pri la eblecoj havigi plejeble multajn komunumajn bibliotekojn kiel abonantojn de Esperantolehti.

La membrosocietaj membrokotizoj estis altigitaj al 3 eŭroj kaj al 1,50 eŭroj por ELFI, FEJO kaj Steleto. La individua kotizo restas senŝanĝa je 18 eŭroj, same la kotizo por societo Nino Runeberg, kiu estas 36 eŭroj, la duoblo de la kotizo por individua membreco.

La daŭra malkresko de la membraro estas zorgita. Laŭ la agadraporto EAF havis en 2003 339 kolektivajn membrojn, 48 individuajn kaj 3 dumvivajn membrojn (laŭ malnova, ne plu valida kategorio), sume 390 membrojn. Tio estas 14 malpli ol en 2002 kaj 25 malpli ol en 2001.

(amr)

La estraro kunvenis

La estraro kunvenis (1/2004) la 28.2.2004 en la EAF-oficejo je 11.30-15.00 kun daŭrigo post komuna lunĉo 16.45-19.00. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, vicestraranoj Tuomo Grundström kaj plejparte Eero Rinta-Karjanmaa, aldone dum financaj aferoj kasisto Anna-Liisa Heikkinen.

La estraro akceptis kun ĝojo ke Mikko Mäkitalo akceptis la taskon de ĉefredaktoro. La estraro decidis dum 2004 pagi al li 25 e/gazeto por uzo de propraj laboriloj, telefonaj kaj aliaj kostoj laŭ fakturo.

La estraro akceptis kelkajn kostofakturojn de estraranoj (vojaĝkostoj sen prezento de biletoj kaj fakturoj super limo de 100 eŭroj). La kasisto estis rajtigita fari transpagon de parto de la disponebla mono de EAF por havigi al la asocio pli bonan interezon.

Anna-Liisa Heikkinen informis, ke ŝi ne plu povos libroteni, sed ke ŝi tamen pretas daŭrigi kiel kasisto. La estraro decidis demandi al Paula Niimikorpi ĉu ŝi pretas fari la librotenadon.

La estraro traktis la lastajn detalojn rilate al Vintraj Tagoj en Jyväskylä. La prezidanto rice-

vis la taskon fari gazetaran komunikon pri VT [komuniko sendiĝis antaŭ VT kaj aperis informo almenaŭ en unu gazeto, tuj dimanĉe post VT estis sendita alia komuniko].

Reage al peto de Dolchamar, kiu organizis koncerton en drinkejo en Jyväskylä la estraro decidis doni senpagan VT-partoprenon kun trankvilo kaj manĝoj (5x20 e kaj 5x42 e) kaj aldone 50 e. La estraro esprimis deziron vidi ĉiujn bandanojn dum VT kaj eble kontribuon dum la malfermo [Patrik Austin prezentis du kantojn kaj reklamis la koncerton, raporto pri la Dolchamar-koncerto ĉi-numere].

La estraro diskutis proponojn pri aganto de la jaro 2003 kaj decidis nomumi la personon dum VT.

La planoj aranĝi Aŭtunajn Tagojn kiel vojaĝon al Lesjöfors nuliĝis pro aliaj planoj de svedoj. La estraro decidis ke AT okazos en Iisalmi 18.-19.9.2004.

La estraro pritraktis la jarkunvenajn raportojn kaj subskribis la bilancon. Irma Heikkilä informis, ke ŝi ne plu pretas membri en la estraro de la Fonduso Propra Ejo.

La estraro decidis mendi anoncon Venu al Finnlando 2005 en Jarlibro 2004.

La vizito de la bardo Mikaelo Bronŝtejn okazis laŭplane 19.1.-31.1.2004: Turku, Rauma, Keuruu, Jyväskylä, Tampere, Kimito, Helsinki, Lahti kaj Lappeenranta [raporto ĉi-numere]. La historia laborgrupo unufoje kunvenis 17.2.2004 en Tampere. FEJO informis pri sia intenco okazigi Kulturan Esperanto-Festivalon 2005.

La estraro diskutis pri la vortara situacio kaj volis esprimi sian subtenon kaj kuraĝigon al la vortara grupo. De la nuna poŝvortaro EAF ne plu havas tre grandan stokon.

La komunikadprojekta grupo kunsidis la 18.1.2004 kaj konstatis la nunan situacion. Urĝa konkreta laboro estos la ordigado de la oficejo kaj de la oficeja biblioteko. La projekta grupo konstatis, ke ĝi bezonos pliajn membrojn post la foriro de Osmo Buller. kaj decidis nomumi Tuomo Grundström kaj Markku Saastamoinen

kiel projektgrupon.

La estraro konstatis, ke EAF bezonas pliajn kovertojn kaj rajtigis la komunikadprojektan grupon plani ilin kun la ellaborota projekta simbolo.

La projekta grupo intencas sendi enketilon al la kandidatoj de la ĉi-jara EU-elekto. EAF uzos laŭeble la tekston de Erkki Röntynen aperintan en 1/2004. [Kopioj de la teksto estis haveblaj en VT kaj ĝi nun aperas ankaŭ rete *www.esperanto.fi.*]

★

La estraro kunvenis (2/2004) 13.3.2004 en Jyväskylä je 17.00-17.10. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Eila Martin, Päivi Saarinen, Markku Saastamoinen, Tuomo Grundström, Eero Rinta-Karjanmaa.

La estraro decidis prezenti la faritajn jarkunvenajn dokumentojn (agadraporto, financa raporto, agadplano, buĝeto) al la jarkunveno.

La estraro decidis nomumi Raita Pyhälä Aganto de la jaro 2003. [La motivoj kaj la ĉi-foja konsisto de la premio en ĉi-numera notico.]

★

La nova estraro kunvenis (3/2004) tuj post la jarkunveno 14.2.2004 je 12.25-12.40. Ĉeestis Anna Ritamäki, prezidanto, Tiina Oittinen, kiu en la kunveno reelektiĝis sekretario, Päivi Saarinen, kiu reelektiĝis vicprezidanto, Tuomo Grundström, Taneli Huuskonen, Markku Saastamoinen, Timo Pirinen kaj Eero Rinta-Karjanmaa. Krome la estraro konstatis, ke kiel kasisto de la asocio ekster la estraro daŭrigas Anna-Liisa Heikkinen.

La estraro konstatis la ricevon de la raporto de la Vortara grupo pri la agadjaro 2003. La Vortara grupo kunsidis unufoje dum 2003.

Päivi Saarinen kaj Anna-Liisa Heikkinen kunsidis prepare al ellaboro de listo pri la nuna praktiko de la oficeja uzo, surbaze de kiu la kontrakto aŭ konsiloj/instrukcioj pri la oficeja uzo povos esti finfarita. La laborgrupo estis plilarĝigita kun Taneli Huuskonen.



▷ La estraro informiĝis pri la planoj de la historia laborgrupo kunsidi en Tampere 30.3. Päivi Saarinen estas la kontaktpersono de la laborgrupo pri oficejaj aferoj.

La sekva kunveno estis decidita por 28.3.2004 en la asocia oficejo, samtage kun la komunikadprojekta kunveno.

(Kompilis la prezidanto)

Nova membro en estraro de ELFI

Dum la jarkunsido la 13an de marto estis Carola Antskog reelektita prezidanto por la jaro 2004. En la estraro daŭrigas Tapio Sormunen (kasisto), Tiina Oittinen kaj Sylvia Hämäläinen (sekretario). Nova estrarano estas Aini Vääräniemi, kiu estas vicprezidanto. Vicestraranoj estas Raita Pyhälä kaj Anna-Liisa Ali-Simola.

La membrotizo estas 22 e por la jaro 2004. (Por la jaro 2005 ELFI havos du membrokategoriojn. ELFI dum membrokunveno en septembro decidis pri la nova membrokategorio.)

La projekto Euroscola-en-Esperanto daŭras laŭ nova modelo. Ĉi-jare vojaĝos 19 lernantoj kaj du instruistoj de Enontekiön lukio kaj grupo de suda Finnlando al Strasburgo. Ili partoprenos al esperanta seminario Eŭropa Amikeco kune kun junuloj el sep Eŭropaj landoj kaj la 28an de aprilo kiel tute normala lerneja grupo al Euroscola.

Carola Antskog

Esperantokurso por infanoj

Dum la vintraj tagoj mi informis pri infankurso la unuan semajnon de junio. Bedaŭrinde la tempo tamen ne estis konvena, sed okazos kurso en Lesjöfors, Svedio inter la 28a de junio kaj 3a de julio kaj se estos intereso ni aranĝos vojaĝon.

Pli da informoj vi trovos ekde la mezo de majo sur la paĝo de ELFI www.esperanto.fi (Suomalaiset esperantojärjestöt).

Carola Antskog

Eventokalendaro de EAF

2004

24-29.4.2004 Eŭropa Amikeco-renkontiĝo + Euroscola, Strasburgo, Francio (ELFI)

5-9.7.2004 Kursoj en Valamo (Valamon kan-sanopisto)

10-17.7.2004 IJK apud Kovrov, Ruslando (TEJO)

24.-31.7.2004 UK en Pekino, Ĉinio (UEA)

25-29.8.2004 Eŭropa Esperanto-Kongreso, Bilbao, Eŭskio, Hispanio (EEU)

18-19.9.2004 Aŭtunaj Tagoj en Iisalmi

2005

februaro/marto Vintraj Tagoj

somero Kultura Esperanto-Festivalo en Helsinko (planas FEJO)

somero Internacia evento en Raŭmo (planas EAF)

23-30.7.2005 UK en Vilnius, Litovio (UEA)

septembro (ekis kontaktoj kun svedaj esperantistoj pri okazigo de AT kiel ekskurson al Esperantodomo en Lesjöfors)

Ekskurso al Porvoo kaj Askola de EKH

Esperanto-klubo de Helsinki aranĝos ekskurson al Porvoo kaj Askola pri Johannes Linnankoski kaj liaj verkoj en Esperanto. Ni ekveturos de Asema-aukio en Helsinki sabaton, la 5-an de junio 2004, je la 10.00. La prezo estos 30 eŭroj. Programo:

- vizito al tombejo Näsi en Porvoo
- Johannes Linnankoski -muzeo en Vakkola
- tagmanĝo en art-kafejo galerio Terehtööri
- vizito al unika naturfenomeno "Askolan hiidenkirnut"

– kafumado en somera domo de Irmeli Tanskanen

– reiro al Helsinki laŭ Kuninkaantie, kun halto ĉe mezepoka preĝejo Sankta Sigfrid

– fino de ekskurso je la 18-a en Helsinki

Bonvole aliĝu antaŭ 2004-05-05 en la oficejo marde de la 17-a ĝis la 19-a horo aŭ telefone al Anna-Liisa Heikkinen, (09) 343 1449, kaj pagu al la konto 101130-229178 de Helsingin Esperantoseura. Koran bonvenon al ĉiuj!

Novaĵoj el Oulu

Esperanto-societo de Oulu havis sian jarkunvenon la 21-an de februaro.

Kiel prezidanto agadas Erkki Röntynen, vicprezidantiĝas Allan Mehtonen.

Aliaj estraranoj estas Eila Martin, Raili Martinen (vice), Stanislaw Mehtonen, Aira Röntynen kaj Auli Vihermä.

La societo daŭrigas siajn ĉiusabatajn kunvenojn je la 12-a horo en la ĉefa biblioteko. Bonvenon!

Onko joku esperantisti ollut tai tuntee jonkun, joka on ollut Jaltalla 1986?

Helmikuun lopulla 1986 olin Jaltalla hotelli Jaltassa. Siellä tutustuin suomalaisiin, mutta emme vaihtaneet osoitteita. Silloin ajattelin, että ehkä emme voi koskaan tavata suljettujen rajojen vuoksi.

Toivoisin vielä tapaavani heitä. Minulle voi kirjoittaa unkarin, slovakian tai saksan kielellä.

Silloin minä lauloin operettisävelmiä unkarin kielellä, yöllä 11. kerroksen baarissa. Meitä oli 7 naista ja yksi pitkä mies.

Serena Schwarz
Narcisovā 1945/8
SK - 927 05 SĀĻA-VEČA
SLOVAKIO

POR LINGVA DIVERSECO EN EU, DONU VIAN VOĈON AL LINDA

Jam en sia unua prezentado okaze de sia kandidateco por la Eŭropa parlamento Linda konstatis:

Vi som har en språklig förankring kan naturligt bidra till att behålla EU:s språkliga mångfald.

Me, jotka omasta kokemuksesta tiedämme kielen tärkeyden, voimme vaikuttaa siihen, että EU:n kielten kirjo säilyy.

Mii, geat iežamet vásahusaid geažil diehtit giela dehálašvuođa, sáhttit váikkuhit dasa ante EU gielaid girjjátvuohta seailu.

Profunde lingve ankritaj ni nature povas kontribui al konservado de la lingva diverseco en EU.



Linda Lindholm, 24-jara studento pri politiko, prezidanto de la junulara organizo Svensk Ungdom 2001-2003, de la komenco de 2004 konatiĝas al EU kiel helpanto de Astrid Thors
sfp/rkp

Tejo-seminaari Brysselissä – Suomi pitkästä aikaa mukana

Fejon puheenjohtaja Patrik A. edusti kunniakkaasti maataan Euroopan komission tukemassa Tejo-seminaarissa Brysselissä 29.2.-7.3.2004. Viikon aikana 23 osallistujaa 15 eri maasta tutustui EU:n hallintorakennelmiin ja -rakennuksiin ja sai koulutusta mm. yhdistyksen julkisten suhteiden hoitamiseen sekä avustusten hakemiseen. Seminaari oli varsin laadukas, silti haiketta herättävät yhteiset laulu- ja peli-illat, joiden aikana hiteiksi muodostuivat biisi Z-A-M-EN-HOF (Ottawanin DISCO-melodiaan) sekä korttipelit Azeno ja Bonan tagon, sinjoro! Ajatuksia vaihdettiin ja kontakteja luotiin niin Tejoon kuin landaihin asocioihinkin. Tähän seminaariin päästiin brittien luovuttua toisesta edustajastaan. Toivottavasti osallistuminen osaltamme jatkuu vastaisuudessakin!

La Tejo-seminarion en Bruselo partoprenis interalie du ĉarmegaj polinoj, **Anus' kaj Irmina**. Anus' (maldekstre en la bildo) volonte intervjuiĝas por la Amdeca Fejo-paĝo.



De kie vi konas unu la alian?

– Mi konas Irminan el Varsovia Vento, nia fama :) klubo de junaj geesperantistoj, kie ni kune renkontiĝas.

Kion vi faras?

– Nun mi lernas – mi estas en la lasta klaso de liceo, kaj poste mi esperas studi polan filologion aŭ turistikon kaj rekreacion en Varsovio, kompreneble. Mi ŝatas ekkoni novajn homojn kaj babili kun geamikoj!

Kial veni al Pollando?

– Pollando estas bela lando, kien vi povas trovi ĉion – ĉi tie estas kaj montaraj kaj maro. Ni havas belajn malnovajn urbojn. En Pollando estas multe da esperantistoj, do mi invitas ! :)

Kia estis la Tejo-seminario en Bruselo?

– Ĝi tre plaĉis al mi – tio estis mia unua renkontiĝo kun eksterlandaj esperantistoj, kaj mi multe eklernis pri interesaj aferoj. Laŭ mia opinio tre bona estis organizado kaj programeroj. Kaj ankaŭ ege plaĉis al mi la nokta vivo de Bruselo!!! :)

Diru kion ajn vi volas al la finna eo-junularo!

– Mi KORE salutas Vin ĉiuj, kaj mi volas diri: mi estas feliĉa, ke esperanto vivas, ĉar ĝi donas al mi kaj aliaj ŝancon por ekkoni novajn kulturojn.

Patrik Austin

Startigita: FEJO/Hki

Helsingin esperantonuoret estas la unua loka sekcio de Fejo. Ĝi havas kurson dekjaŭde dum la printempo en la eo-oficejo, post kiam (proksimume je la 19-a) oni iras al loka trinkejo Maskoto por ludi eo-ludojn kaj plibonigi la mondon. Nehelsinkanoj: ne ploru, sed starigu vian propran lokan sekcion! Vi trovos instrukciojn en <http://www.esperanto.fi/fejo/datumbazo/paikallisjaoksista.htm>.

Patrik Austin

PS: Ĉu vi pretas por la veno de KEF 2005 en somera Helsinko?


Afrodizia premio

Dum FEJO-semajnfino en Rauma FEJO la unuan fojon elektis la plej afrodizian kovrilon de

Lempiasioita – Am-aferoj

Fejolaiset kertovat lempiasioistaan.

Koonnut: Katja Lampinen.



la pasinta jarkolekto de EF. Nomumita estis la numero 2/2003. Gratulojn al fotitoj kaj fotinto. Ni esperas, ke la nomumo instigos atingi pli kaj pli afrodiziajn kovrilpaĝajn fotojn.

Estraro de FEJO



Timo "TiPi" Pirinen

Prefera lingvo

Mia amafero estas nia lingvo, lingvo de Esperanto. Ĉu mi havas favoritan vorton en Esperanto? Jes nature, la nomo de la lingvo. Kial nomo de Esperanto? Ĉar ĝi enhavas multajn bonajn pensojn kaj mi esperas, ke ili okazu en la mondo. Ekzemple paco, amo, frateco k.t.p. Kaj la kaŭzo numero du: Se vi ne scias korektan vorton, vi kapablas fari tion. Tio donas plian liberecon de esprimoj al vi. Jen estis la bazaj kaŭzojn kial mia amafero estas amlingvo.

FEJO-infoa 2004

Jyväskylä vuosikokouksessa 13.3.2004 valittiin FEJO:n hallitus tälle vuodelle:

Puheenjohtaja Patrik Austin, Helsinki

Varapuheenjohtaja Pipsa Ahonen, Turku

Sihteeri Katja Lampinen, Helsinki

Kassanhoitaja Paula Niinikorpi, Rauma

Jäsenet Mikko Mäkitalo, Turku ja Timo Pirinen, Hamari

Jäsenmaksu on tänä vuonna alle 30-vuotiailta 13 euroa ja 30 vuotta täyttäneiltä tukijäseniltä 12 euroa. Varsinaisten jäsenten maksuun sisältyy tuttuun tapaan Esperantolehden vuosikerta.

Jäsenmaksun voit maksaa postissa tulevalla tilisiirtomakkeella. Jos sellaista ei näy eikä kuulu, voit suorittaa maksun myös suoraan FEJO:n tilille 101130-227446 (Merita). Jos olet uusi jäsen tai tietosi ovat muuttuneet, kerro sihteerille nimi, osoite ja syntymäaika. Voit soittaa: 040 523 6076 tai lähettää sähköpostia: katja.lampinen@suomi24.fi. Tänäkin vuonna Sinut pitää parhaiten menossa mukana FEJO:n postituslista, jolle voit liittyä lähettämällä tyhjän viestin osoitteeseen

fejo-subscribe@yahogroups.com

FEJO, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi, www.esperanto.fi/fejo

Dolchamar rokas kaj furoras hejmlande

Antaŭ unu jaro nia fama, finna espobando, Dolchamar, ŝanĝis ne nur sian nomon (nun: Dolchamar), sed ankaŭ preskaŭ komplete la ularon. El la x-forma prabando restas nur la komponisto-lirikisto Pieĉjo kaj Stoedoe, la basisto. Sekve la nova konsisto estas jena: Pieĉjo (kanto), Larputilo (gitaro), Stoedoe (basgitaro), Lenja (klavaro) kaj Valdemar (drumaro).

La 13-an de marto la nova Dolchamar havis sian unuan koncerton en Finnlando iam ajn. Okazis en la rokklubejo Poppari en Jyväskylä. Samurbe, samtage okazis tiam la Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando. La koncerto de esporoka bando vaste interesis la regionajn amaskomunikilojn. Dolchamar aperis novaĵforme en la kulturpaĝoj de pluraj regionaj gazetoj sub titoloj "Esperantlingva roko en Poppari" kaj "La plej fama espobando de la mondo en Jyväskylä", inkluzive la plej granda regiona ĵurnalo "Keski-suomalainen". La koncerton notis ankaŭ loka radiostacio "Radio Jyväskylä" kaj kelkaj retaj rokgazetoj kiel www.letsmakesomenoise.com kun titolo "Jyväskylässä rockia esperantoksi".

Sekve la klubejo estis preskaŭ plenplena. Jam antaŭ la koncerto aŭdeblis konversacioj: "Mi legis en ĵurnalo, ke ili venas de Porvoo." Eĉ se en la publiko troviĝis deko da esperantistoj, kiuj scipovis kunkanti la refreojn, la plejparto estis lokaj ne-esperantistaj gejunuloj. Ili videble ŝatis la bandon, dancis antaŭ la scenejo kaj laŭte postulis ekstraĵojn post la pli ol unuhora koncerto. Ilin neniom ĝenis la fakto, ke Pieĉjo interpece parolis ĉefe esperante. Post la koncerto oni kolektis sufiĉe longan fanliston por posta informado pri dolchamaraj aferoj. Pluraj postkoncerte demandis: "La bando sonas bonege, sed diru, kio estas nun tiu lingvo?"

En Poppari oni ja aŭdis ankaŭ la malnovajn furoraĵojn "Ĉu vi pretas?", "Malbonulo", "Pacman" kaj "Junaj idealistoj". Sed ĉefe ni aŭdis tute novan, splendan materialon, post kio oni soife atendegas la aŭtune 2004 aperontan albumon. La mikso de malnovaj kaj novaj pecoj ja povas kaŭzi iometan konfuzon pri la stilo de ĉi kameleona bando. Laŭ finna rokkritikisto, Hannu Linkola, kiu antaŭ ne longe intervjuis Dolchamar por reta rokgazeto Rockmusica, la bando sonas jen rokroke, jen slave melankolie, jen latinrape, sed ĉiel ajn bonege. La stilo de la nova Dolchamar tamen klare ŝanĝiĝis al pli melodie roka direkto. "Ni estas iom kiel Cardigans, pli roke spicita tamen", priskribas Pieĉjo mem. Bone notu jam anticipu la peconomojn "Ĉi tio povas iĝi nenio", "Akcidentoj", "Kio estas ĉi sento", "Subamiĝi" kaj "Himno de EsperHe" – ili ĉiuj sonas furoraĵe jam je la unua aŭdo.

Dumlude el la grupo radias kuneco. Klare oni aŭdas, ke ili longe ludis kunaj. Pieĉjo, kiu transprenis la kantorespondecon mem, sukcese ĉarmis la publikon eĉ havante fortan gripcon. Vivdrumisto donis al la tuto bone firman sonon. Aparte menciindas, ke Dolchamar nun havas inan klavariston – muzikistinojn en Esperantujo ja ne tro svarmas.

Foje oni akuzis la bandon pri tro malfacile kapteblaj lirikaĵoj. Aŭdeblas ankaŭ ioma stilŝanĝo eĉ en la teksta flanko, kaj vorte kaj teme. La

LA PLEJ FAMA (FINNA) EO-BANDO
dolchamar
KONCERTOS 2004-05-13 EN FACTORY
JE LA 22-A. SUPORTAS. ACEDIA
BILETOJ 3€ NE MALTRAFU
adreso Siltasaareнк. 3 - 5 Helsinko

tekstoj nun estas iom pli ĉi-mondecaj – tamen nenio por komencantoj. La lirikisto, Pieĉjo, ŝajnas havi intense pasian amrilaton al vortoj, kapablon al orekkaresaj frazfluoj kaj freŝan eksperimentemon. Jen kelkaj fragmentoj el la onta disko:

*”Senarma nur min lasas vi
ĉar vi bezonas nenion plu de mi
jam gambovjolo silentiĝis for
nur vojo kota ĝis la ruinaĵ’ serpentas sor
Eblas nostalgii horon en rev’
Sed grandioza epok’ de kasteloj estas preter.*

*Kaj se ĝi daŭrus plu,
Mj’ estas neni hero’
Nek vj’ estas princin’
Kaj ĉi tio povas iĝi nenio.”*

(Ĉi tio povas iĝi nenio)

*”Miaj du grandaj desapoentoj
kvazaŭ neforgesindaj indicentoj
unu estis ŝial, dua estis lial
ambaŭ akcidentoj
sufere senespere sed vere ĉi-vespere
reve pri l’momentoj”*

(Akcidentoj)

Ĉi-somere oni bedaŭrinde ne spertos Dolchamar en esperantaj scenejoj, ĉar la bando pasigos la someron studie pro la nova albumo. Ili tamen koncertos ĉi-jare pli kaj pli propralande, en finnaj rokrondoj. Sekvafoje la 13-an de majo en helsinka rokklubejo Factory kaj dum la somero supozeble en kelkaj rokfestivaloj – en esperanto kompreneble. Kaj fine de marto aperos longa bandoprezento pri Dolchamar en finna rokgazeto Rockmusica (www.rockmusica.net). La kritikisto de tiu gazeto vizitis la geknabojn en la trejnejo por intervjuo. La intervjuo titoliĝas esperante ”Daŭre roku en la libera mondo!” Samintervjue oni multe traktas ankaŭ esperanton.

Sed ĉu vi jam aŭdis, ke KEF 2005 okazos en Helsinko?! Tiam staros Dolchamar sur la scenejo de unu el la plej grandaj rokklubejoj de Hel-



En supra vico el maldekstre Lenja, Valdemar kaj Stoedoe, malsupre maldekstre Pieĉjo kaj dekstre Larputilo.

sinko. Ne maltrafu tion!

Intertempe, la paĝoj de Dolchamar videblas ĉi tie: www.nettie.fi/dolchamar.

Riitta Hämäläinen

PS. Ĉu vi scivolemas, kio poste okazis al Sarĉjo, Hipo Ohvo kaj Doktoro Espo, la ne-videbla drumisto, de la bando?

Sarĉjo nun umas kaj kantas angle en la bando Copter: www.coptertheband.net

Hipo Ohvo gitarumas kaj komponas finne por Acedia: www.acedia.info

Kaj la mistera kaj mizantropa Doktoro Espo, kiun nur malmultaj vidis vive, nun koncentriĝas al sia lingvistika laboro: www.nettie.fi/droEspo. Lastatempe oni aŭdis klaĉojn pri vere sovaĝa nova projekto...!

Ridema fein'

M. Mäkitalo & P. Austin

Gm C F Gm C
 Ĉe mil - de on - dan - ta kaj ĉar - ma la - ge - to nun es - tas mo - des - te di -
 Dm B♭ C F A7
 ra - ta ĉi pe - to. Ne - ni - am nin la - su en plu - vo kaj frid', eĉ
 Gm C A7 B♭ C
 ki - am vin ten - tas propr - ej - o kaj id', ĉar tra - fus nin lan - te ja
 F A7 Gm C A7 Dm
 mor - no kaj griz', kaj tris - to, va - ku - o kaj krip - la pa - ra - liz'. Mi
 B♭ C D A Dm Gm
 sen - tas ke mi pa - ra - liz - e - ma es - tus, ĉar ĉe la la -
 C D Dm A7 Dm Gm C
 ge - to mi plu pen - sas: Ki - e vi es - tas? Ho, dol - ĉa kre -
 Dm Gm C Dm C A7 Gm C
 a - ĵo, rid - e - ma fe - in', ne la - su nin! De ni - aj
 Dm A7 Dm Gm C Dm A7 Dm
 ko - roj vi es - tas reĝ - in', ho Kat - ja, ni a - mas vin!

Muut lehdet

Helsingin yliopiston esperanto-seura

Helsingissä joka päivä ilmestyvä Metro-ilmaisjakelulehti uutisoi 25.2.2004 lyhyesti Helsingin yliopistoon perustetusta Esperanto-seurasta, EsperHestä. Toiminta alkaa ensi syksynä. Tietolaatikossa esiteltiin kieli suunnitelmakielenä ja arvioitiin sen osaajien määrää maailmalla ja Suomessa.

Patrik Austin Brysselin seminaariin

Helsingin Sanomien Järjestöt-palstalla kerrottiin Suomen nuorten esperantoliiton puheenjohtajan Patrik Austinin osallistuvan Brysselissä Euroopan komission kustantamaan seminaariin, jonka nimi on ”Nuorten rekisteröitymättömät järjestöt sekä niiden rooli ja mahdollisuudet Euroopassa”. Seminaarin työkieli on esperanto. Jutussa mainitaan Patrikin opintotaustat ja lisäksi hän arvioi käyttävänsä seminaarin oppeja Suomen nuorten esperantoliiton toiminnassa. Hän piti esperantoa helppona kielenä.

Vieläkö esperantoa harrastetaan?

Munkinseutu-lehti – helsinkiläinen kaupunki- ja paikallislehti – kysyi jutun otsikossa ”Esperanto – vieläkö joku harrastaa sitä?” Puolen sivun jutussa esitellään EAF:n toimiston sijainti ja siellä tapahtuvaa toimintaa, puhutaan esperanton harrastuksesta maailmassa ja sen rakentamisen perusteita.

Esperanto-rockista esitellään Dolchamar, jonka toiminnasta haastatellaan Patrik Austinia. Hän puhuu myös koko maailman esperantorokkareista ja rockin esittämisestä esperantoksi. ”Keikkoja ja yleisöä on joka puolella maailmaa”. ”Nyt on tullut keikkakutsut Italiaan ja Venäjälle, aikaisemmin niitä on tehty Ruotsiin, Saksaan ja Ranskaan.”

Jutun lopussa oli parikymmentä musiikkisanaa esperantoksi sekä maininta Esperantokursseista keväällä tiistaisin EAF:n ja Helsingin esperantoklubin tiloissa klo 19-20.

Mikael Bronstein Kemiössä

Kemiön oma lehti, Annonsbladet för Kimito bygden kirjoitti 5.2.2004 suomeksi ja ruotsiksi, mutta ei esperantoksi, Mikael Bronsteinin vierailusta Kemiössä. Hän oli Suomen kiertueella ja esiintyi yhdeksän kertaa Kemiön käynnillä. Hän esiintyi kouluissa aamunavauksissa ja musiikkitunnilla sekä kansalaisopistossa. Mikael lauloi esperanton lisäksi venäjäksi ja muilla kielillä.

Jutussa esiteltiin Bronsteinin syntymä- ja koti-tausta. Esperanto-ryhmän tapaamisessa hän keskusteli ryhmäläisten kanssa. Suomeen hänet oli kutsunut Suomen Esperantoliitto. Paikallisena tulkkina ja järjestelijänä oli Carola Antskog, esperanton opettaja Kemiöstä.

Jukka Noponen

2. Por ago kaj emo vi estas la fonto,
por laca etoso la reinstigonto.
Refoje vi iĝu sekretariin',
alie aferoj iregos al pin'.
Ho, kara Katinjo, ĉu mortu movad',
ĉu dronu jen tuta la junular-agad'?
Nun savu Katinjo la idealismon!
Ĉar nur vi, Katinjo, por ni tion fari kapablas.
Refr. Ho dolĉa kreaĵo, ridema fein' ...ktp

*M. Mäkitalo, P. Austin, R. Hämäläinen,
T. Pirinen, L. Viinanen*

*Iam estas malfacile logi homojn por preni
gravajn asociajn taskojn. Ekzemple FEJO
ĉi printempe strebis inviti sian eksan bon-
egan sekretarion denove al tasko. Per tiu
ĉi kanto ni faris al Katja Lampinen pro-
ponon, de kiu ŝi ne povis rifuzi.*

Eroj el debato en Hufvudstadsbladet

Lingvaj problemoj daŭre estas debatitaj en la svedlingva gazetaro en Finnlando. La ĉefaj temoj estas la rolo de la sveda lingvo en Finnlando kaj la hegemonio de la angla. Ni havas novan lingvoleĝon sed en la praktiko ĉio ne bone funkcias en la du naciaj lingvoj. Pli kaj pli ofte la angla ŝajnas esti la dua nacia lingvo. Mi ĉi-vintre partoprenis kun tri skribaĵoj al debato-paĝo de Hufvudstadsbladet. Ili aperis ĉiam preskaŭ neŝanĝitaj kaj la rubriko estis mia aŭ pli bona ol mia, la rubrikoj estis ĉiam pli kaj pli grandaj. Foje esperanto estis menciita en la rubriko. Mi referas ĉi tie la ĉefajn punktojn de la skribaĵoj.

Pensoj pri lingvoj (Hbl 24.1.)

Estas tempo por homaro pensi en tute novaj manieroj en multaj sferoj. Se ni ne volas vivi en lingva sklaveco ni bezonas vizion. Sur la globala marketo oni ja vane nur indikas je homaj rajtoj. Ni bezonas etikan kompletan pensadon por ke ni povas veni el "la rajto de la plej forta" al scio pri la egalvaloro de ĉiuj lingvoj.

Se ni povas vidi nin mem en kompleta bildo de la homara familio, ni povas senti ke nia nacia identeco plene kompletigas nian universalan identecon.

La ideo de universala neŭtrala lingvo kiel la internacia lingvo esperanto estas principo kiu ebligas ke rajtoj kaj devoj disiĝas laŭ "la ora regulo". Tio signifas ke oni ne vidas nur mian lingvon kaj vian sed ankaŭ nian. Tiam estas espero ke pozitiva valorneŭtraleco troviĝas ankaŭ en aliaj sferoj de nia pli kaj pli multkultura socio.

Ni ne bezonas forigi iun nacian lingvon. Sed ni povas jam prepari nin por preni pason al hejmolando kie ĉiu havas propran individuan lingvon kaj ĉiuj havas komunan universalan lingvon.

Ĉu esperanto povas iĝi laborlingvo en Eŭropo?

(Hbl 11.2., mallongigita refero)

La unuan grandan pozitivan sperton de uzo de esperanto mi havis komence de mia esperantisteco en Roterdamo kiam mi estis en grupo de deko da homoj el diversaj landoj kaj la nura komuna lingvo estis esperanto. Esperanto fakte estis kiel ĉies propra lingvo, oni identitiĝas kun ĝi pli bone ol kun iu nacia lingvo. Oni sentas sin aparteni al la sama kultursfero, kompreneble sen esti perfektaj kosmopolitoj.

Mi partoprenis en multaj skandinaviaj kunvenoj kaj ĉiam parolis svede aŭ skandinave se eblis, tamen nuntempe ofte la baltaj landoj ankaŭ kunestas en nordiaj seminarioj ktp. do la sveda ne taŭgas kiel antaŭe; plej ofte estas iuspeca angla kiu dominas.

La societoj ĉie iĝas pli kaj pli multkulturaj. Tamen "pli kulturaj" ni povas iĝi nur se ni iĝas "pli universale homaj". Ni bezonas novan "socian pontokonstruarton".

Mi povas vidi la neŭtralan universalan lingvon esperanton iam estontece kiel laborlingvo en EU. Certe ĝi malhelpus hegemonion kaj multajn konfliktojn. Pro tio ĉiuj lingvoj gajnus. Tial mi konsideras mian apogon al esperanto kiel apogo al la sveda kaj aliaj lingvoj, precipe la malgrandaj. Mi esperas ke tiuj kiuj decidas pri la lingvaj rajtoj i.a. de la finlandsvedoj, vidus la eblecojn de esperanto kiel pontlingvo.

Mi ankaŭ skribis ke mi gojiĝas ke Osmo Bulter denove estas elektita ĉefdirektoro de UEA.

Ĉu ni devas lerni multajn lingvojn?

(Hbl 6.3.)

Mi kontinuas miajn pensojn pri esperanto kaj aliaj lingvoj (Hbl 24.1. kaj 11.2.) komente la artikolon en kiu estas priskribita la pensoj de

profesoro Christer Laurén pri la finlandsveda lingvo. (Hbl 16.2.)

En la fino de la artikolo estas skribita tiel: "Samtempe kiam oni flegas sian propran lingvon oni sekve devas lerni multajn aliajn lingvojn. Estas kompreneble paradokso". Iomete antaŭe en la artikolo: "Ni devas esti pli bonaj vendistoj de la sveda kiel mallongiga vojo al la germana, franca, hispana kaj aliaj lingvoj". Ankoraŭ pli antaŭe Laurén diras ke "finnoj kaj finlandsvedoj havas komunan intereson trovi riskigantan konkuron al la angla. Ni bezonas multajn lingvojn".

Por mi estas iomete malfacile vidi la mallongigan vojon se oni unue devas lerni la svedan por pli bone lerni la francan por ke la hegemonio de la angla malpligrandiĝus. Kaj al la rusa, la ĉina, la araba kaj la svahila kaj aliaj grandaj lingvoj la sveda apenaŭ estas direkte mallongiga vojo, ĉi tiuj lingvoj, kaj aliaj, gravas tamen. Aparte la ĉina lingvo gravos pli kaj pli estontece laŭ Linda Jakobson, kiu en artikolo en Etelä-Suomen Sanomat (15.2.) bedaŭras ke la ĉina lingvo ankoraŭ ne estas instruata en la lernejoj de Finnlando. Ŝi diras ke estontece oni en Finnlando bezonos scion de la ĉina lingvo same multe kiel oni hodiaŭ bezonas la anglan. Ŝi certe pravas. Nur parte se eblas lerni ankoraŭ esperanton en la lernejoj.

Ĉu vere pravas ke ni devas lerni multajn lingvojn por bridi "la vivdanĝeran anglan lingvon"? Ankoraŭ estas feliĉe ĉir-

kaŭ 6000 lingvoj en la mondo. La homaro bezonas ĉiujn de ili (inkluzive la anglan), tamen ni ne bezonas lerni ĉiujn lingvojn (ankaŭ ne la anglan), tamen ni devas ilin respekti, interesiĝi pri ili, aŭ se oni volas proklami solene: ni devas ilin ami same kiel nian propran lingvon, ĉar ili estas parto de ni. Oni povas ankaŭ diri ke en nuntempa mondo ni ne povas lukti nur por niaj rajtoj, ĉar NI estas pli kaj pli ankaŭ LA ALIAJ.

Esperanto ja naskiĝis fine de la 19a jarcento proksime al la geografia centro de Eŭropo, en fokuso kie multaj lingvoj, kulturoj kaj diversaj moroj vivis flanko ĉe flanko. Estis historia erao kiam Ruslando kaj la rusa lingvo forte subigis aliajn popolojn kaj lingvojn en la orienta Eŭropo. Jam multaj cirkonstancoj sanĝiĝis, tamen la homoj kontinuas subigi lingve, ĉie en la mondo.

La naskiĝo de la universala, tuthoma lingvo esperanto ne estas hazarda okazo, estas liberema, ĝi estas nun bezonata. Krome ĝi stimulas la gustumadon; ĉiuj lingvoj kaj kulturoj de la mondo iĝas allogaj kiel korbo da koloraj paskaj ovo!

Börje Eriksson

duplustro



Sur la nokta ĉielo

Dum tiu ĉi printempo la vesperan ĉielon ornamas tuta vico de brilaj planedoj. La plej brila de ĉiuj estas Venuso, nia plej proksima najbarplanedo. En okcidenta direkto post subeniĝo de la Suno ĝi neeviteble kaptas atenton de rigardanto. Ĝi estas la plej brila astronomia objekto post la Suno kaj la Luno ĉiam, kiam ĝi estas en videbla situo.

La due plej brila estas Jupitero, kiu dum subeniĝo de la Suno estas en suda direkto, estante la klare plej brila objekto tiudirekte. Inter la du estas Saturno, kies brileco preskaŭ egalas kun la plej brilaj steloj. Kaj videbla estos ankaŭ Marso, kiu dum aŭtuno estis tre brila, sed nun moviĝis pli distanca de ni kaj tial ne plu tiom brilas.

Nun estas oportuna okazo kompari aspekton de planedoj kun aspektoj de brilaj steloj, kiuj ankaŭ videblas multaj. Estas vaste konata fakto, ke stelo svingiĝas (*tähti tuikkii*), t.e. kvazaŭ ke stelo ŝanĝadus kaj brilecon kaj situon en periodoj de frakcio de sekundo, sed planedo staras konstanta. Tio estas ankaŭ la sola trajto, pro kiu oni (eble) povas nudokule distingi stelojn kaj planedojn, alimaniere ili ĉiuj aspektas nur lumpunktoj sur la ĉielo.

La fenomeno, ke stelo svingiĝas, naskiĝas en atmosfero de la Tero. La steloj mem neniel oscilas en periodo de sekundoj, sed aero en atmosfero moviĝas kaj kaŭzas ke la lumo refraktiĝas (*valo taittuu*). Plej evidenta tiu fenomeno estas apud la horizonto – stelo malalte apud horizonto sving-


iĝas pli ol stelo alte sur la ĉielo.

La kaŭzo, ke planedoj ne tiom svingiĝas, estas ilia signifa videbla diametro. Rigardo per teleskopo montras, ke ĉiuj steloj aspektas, eĉ per plej grandaj teleskopoj, esti nur lumpunktoj, sen iu ajn videbla diametro. Ili estas tiom distancaj, ke iu diametro ne videblas. De planedoj tamen oni per teleskopo facile vidas, ke ili estas ne nur lumpunktoj, sed globoj kun videbla diametro. Unuopa lumpunkto svingiĝas laŭ moviĝoj de atmosfero, sed lumo el diversaj lokoj sur la surfaco de planedo ebenigas la efikon de svingiĝo de unuopaj punktoj de ĝia surfaco.

Estas interese kompari ekzemple Saturnon kun la preskaŭ sambrilaj steloj Capella, Betelgeuze kaj Procyon. Saturno devus klare distingiĝi de la steloj per pli konstanta aspekto.

La serio Sur la nokta ĉielo finiĝas ĉi tie. Verkinto dankas pro la intereso de la legantoj kaj daŭrigas faradon de la gazeto en ĉefredaktora rolo.

Mikko Mäkitalo



En fino de aprilo, kiam ankoraŭ vesperoj mallumas, videblos kvar planedoj kaj multaj steloj, kies brileco proksimume egalas tion de Saturno. La bildo taŭgas por tempo 1 ĝis 1,5 horoj post subeniĝo de la Suno, ekzemple 25.4. je 22.30.

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ◆ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ Taneli Huuskonen, huuskone@cc.helsinki.fi
www.esperanto.fi/helsinki
- ◆ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi
- ◆ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609
☎ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ◆ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti.
☎ martti.pennanen@phnet.fi
- ◆ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ◆ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
☎ matti.wallius@ebaana.net
- ◆ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstie 37, 37500 Lempäälä, ☎ lauri.liukkonen@jippii.fi)
- ◆ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ◆ Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ◆ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ◆ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.
☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jol-

loin jäsenmaksu v. 2003 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Mietinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla, Hämeenlinnassa ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2004**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAf, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Dolchamar mirigis publikon en Jyväskylä per sia stranglingva peza roko. Kantisto Pieĉjo, drumisto Valdemar, gitaristo Larputilo, klavaristo Lenja kaj ekster foto lasiĝinta basgitaristo Stoedoe ŝvitas sur scenejo, kiam ankoraŭ iom pli famaj Elvis Presley kaj David Bowie rigardas el muro de la ejo Poppari. (Artikolo sur p. 24-25)

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuun alussa. Jutut 15.5.2004 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en la komenco de junio. Artikoloj ĝis 15.5.2004 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2004